N-o 2. 1937. 9. IV.

# BULTENO

## DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefono n-ro 718-41.*

*Redaktas: ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## *Raporto pri agado de Esperanto-Asocio en ĈSR en 1936.*

Kelkajn ĝeneralajn konsiderojn ni jam diris en la 1-a numero de Bulteno kaj ĉar ni detale raportis dum la jaro en la Bulteno, povas nia raporto esti konciza. Ofte ni povas citi sole paĝojn de la pasinta jarkolekto.

1. **Konsisto de la komitato.** La komitato, elektita en nia fonda kunveno dum la sesa ĉehoslovaka kongreso esperantista en Brno la 28. IX. 1935, komencis funkcii nur post la lasta ĝenerala kunveno de Ĉehoslovaka Asocio Esperantista, kiu transdonis al ni ĉiun sian havaĵon, laborantojn kaj tradicion. Sed la komitato estas pli ampleksa ankaŭ laŭ kultura vidmaniero, ĉar enestas en ĝi reprezentantoj de nialandaj germanoj. La komitato dividis la funkciojn en la unua sia kunveno en Praha la 16-an de februaro 1936. La unua komitata kunveno kreis ankaŭ pli grandan nombron de komisionoj kaj trovis rimarkindan nombron de novaj estroj komisionaj. La listo rezultinta estas sur p. 21. Kvankam la komitatanoj loĝas en tre diversaj lokoj de la respubliko, estis ilia kunlaboro tre bona. La divido de la funkcioj estis sen ŝanĝo dum la tuta jaro.

2. **Komitataj kunvenoj** estis 7, ĉiuj en Praha. Unu estis prezidita de prez. Kamaryt, unu de vicprezidanto Mr Höfert, la ceteraj de vicprez. Ginz. Al ĉiuj kunvenoj venis pluraj informaj kaj instigaj leteroj de la komitatanoj ekster-Prahaj. Kopioj de la protokoloj ciklostilitaj estis sendataj regule al ĉiuj komitatanoj. Protokolis en ĉiuj kunvenoj ĝen. sekr. ark. Frant. Staněk, ciklostiladis kaj dissendadis la protokolojn Mir. Staněk.

3. **Regionaj kunvenoj.** Niaj reprezentantoj ĉeestis kaj oficiale parolis en ĉiuj iom gravaj kunvenoj esperantistaj. Dum inaŭgura festo de Memorŝtono en L i c h n o v parolis en nia nomo Inĝ. L. Krajc, en regiona kunveno en L. B ě l o h r a d K. Koutek, en E-ista rendevuo en H r a d e c K r á l o v é vicprez. Ginz, ĉe Kursfina festo en D u b í V. Echtner, ĉe regiona kunveno en N o v é Z á m k y Charvát, ĉe ĝenerala kunveno de Regiona Ligo Esperantista en Č. T ě š í n kasisto Friedrich.

4. **Administrado.** Ni transprenis de ĈAE sistemon de komisionoj elprovitan dum pluraj jaroj kaj ni provis pligrandigi nombron de komisionoj kaj eĉ doni al la komisiona estro du-tri kunlaborantojn. Tiu metodo bezonas ankoraŭ tempon por pliperfektiĝi, ke la estro de komisiono ne estu unusola ĝia laboranto. En kelkaj fakoj ĝi jam efektive okazas tiel. La listo de la komisionoj estas sur p. 21. Al komisionoj tie enskribitaj aliĝis dum la jaro komisiono skolta kun Fr. Buhr, kiel estro. Ekster la komisionoj daŭrigis Fr. Slavík sian gravan helpon al nia organizo kaj al ĉiuj nialandaj esperantistoj kiel estro kaj ĉeflaboranto de la Libro-Servo.

Krom tio li ankaŭ dum tiu ĉi jaro estis nia honora oficejestro, kiu akceptadis korespondaĵojn, respondadis multajn el ili, kaj la ceterajn dissendadis al kompetentaj funkciuloj. Krome li dissendadis la Bultenon. Li meritas dankon tute apartan pro sia sindono al nia organizo. La gvida centro de asociaj laboroj estis ĉe vicprezidanto Ginz. Ni depost 1-a de februaro ne plu havis oficiston, tial estis vicprezidanto Ginz ekstreme okupita. Unu nia skribmaŝino estas ĉe prezidanto, la dua, ĉe la gvidanto de membra administrado O. Štěch, multobliga aparato ĉe M. Staněk, kiu laboras per ĝi. Ni rigardas tian staton provizora kaj ni serĉas taŭgan ejon kaj lertan oficiston.

Por o f i c e j a f o n d a ĵ o ni faris dum la jaro neniun propagandon. Tamen venis kotizoj de:

| | | |
|---|---|---|
| Ing. A. Fotul, Rachov | Kč | 10·— |
| Josef Kosina, Praha VII. | „ | 10·— |
| J. David, Liberec | „ | 5·— |
| Esperanto-Verein, Weipert | „ | 10·— |
| W. Mauksch, Lubica | „ | 25·— |
| Kun sumo de 1. I. 1936 | „ | 2613·30 |
| sumiĝas oficeja fondaĵo 31. XII. 1936 | Kč | 2673·30 |

La donacintoj akceptu nian sinceran dankon. Tiu ĉi listo estas la 5-a.

Al fondaĵo ekzamena venis dum la jaro neniu donaco.

Nove ni kreis fondaĵon de Bulteno. Vidu pri ĝi paĝon 30!

Sumo de forsenditaj leteroj kaj poŝtaĵoj estis 3639, de presaĵoj 1578. En la antaŭa jaro estis interrespondaj nombroj 2221 kaj 3061. En tiujaraj ciferoj ne estas enkalkulitaj ciferoj de forsenditaj cirkuleroj kaj kompreneble ankaŭ ne la ekzempleroj de Bulteno.

5. **Ekspozicia materialo (komisionestro E. Beran).** La stato de kolekto restis sen grava ŝanĝo. La materialo estas jam ordigita laŭ enhavo kaj laŭ praktika uzebleco. Sed taŭga bretŝranko, pri kies donaco ni petis lastan jaron, mankas ĝis nun daŭre. La granda parto de materialo estis tiun jaron pruntita Brnon, kie ĝi estis uzita por ekspozicio dum la katolika kongreso, pri kiu ni raportis sur p. 39. Krome estis la materialo pruntita en urbon Melč. La albumo de EAĈSR estas daŭrigata; estis enmetitaj pluraj fotografaĵoj kolektiĝintaj ĉe la funkciuloj dum la jaro. Ni rekomendas al samideanoj neniam forgesi sendi ĉiun foton al nia komisionestro, por ke la rememoro pri ĉiuj niaj kunlaborantoj estu konservita.

6. **Informado pri esperantistaj entreprenoj.** Nia daŭra klarigado havis sukceson tiel, ke nun ni jam ricevas informojn preskaŭ pri ĉiuj entreprenoj kaj ni sukcese klopodas, ke niaj Kroniko kaj Lokaj informoj en la Bulteno estu kompletaj. Ni donas ankaŭ tiun jaron nomaron de lokoj, pri kiuj ni povis raporti dum 1936: Asch, Bakov n. J., Bardejov, Bohumín, Bor, Böhm. Leipa, Bratislava, Brno, Břeclav, Březová, Cvikov, Č. Kamenice, Č. Třebová, Č. Budějovice, Č. Těšín, Darkov, Děčín, Dobrovice, Dolní Bousov, Dolní Marklovice, Doubrava, Drahowitz, Dubí u Kl., Falkenau, Frýdek, Fryštát, Hor. Litvínov, Hradec Králové, Hluk, Hrušová u C. n. L., Gablonz a. d. N., Grünwald, Jablonecké Paseky, Jägerndorf, Jaroměř, Jičín, Jihlava, Kladno, Kolín, Komotau, Košice, Kratzau, Kukleny, Kutná Hora, L. Bělohrad, L. Štramberk, Levice, Lichnov u Fr., Litice, Litoměřice, Lubná, Melč, Michalovce, Milevsko, Ml. Boleslav, Mnichovo Hradiště, Mor. Ostrava, Nové Zámky, Nový Bohumín, Nymburk, Olomouc, Orlová, Pardubice, Parkán, Plan b. M., Plzeň, Poruba n. O., Praha, Prešov, Příbor, Prostějov, Radvanice, Reichenberg, Röhrsdorf, Rychnov, Semily, Smržonka, Slezská Ostrava, Spišská Nová Ves, Stonava, Svitavy, St. Joachimstal, Teplice-Šanov, Třebíč, Třinec, Turnov, Uh. Hradiště, Ústí n. L. (Aussig), Vítkovice, Vodňany, Vratislavice, Vrútky, Warnsdorf, Zlaté Moravce, Znaim, Železný Brod, Žilina. Sume 96 lokoj. Antaŭ jaro same 96 lokoj. Hodiaŭ ni atentigas pri tiu ĉi sufiĉe alta nombro por instigi komparon kun listo de niaj lokaj grupoj. En ĉiu el tiuj 96 lokoj povas ekzisti loka grupo. Kie estis organizita kurso aŭ prelego aŭ ekspozicio, tie certe troviĝas tiom da interesantoj, ke oni povu inter ili trovi almenaŭ 8 organizeblajn en loka grupo. Tial ni tre varme rekomendas al samideanoj relegi la nomaron kaj kompari ĝin kun listo de niaj lokaj grupoj. Estu tasko de tiu ĉi jaro fondi lokan grupon de nia asocio en ĉiu el tiuj lokoj, kie ĝi mankas ankoraŭ. Tio signifas praktike enkasigi en tiuj lokoj po 16 kronoj de almenaŭ ok homoj. Tio ne estas tasko malfacila. Ofte plendas niaj amikoj, ke ni ne donas taskon al ili. Jen tasko efektiviginda kaj efektivigebla.

7. **Lokaj grupoj.** Ni transprenis ĉiujn grupojn de estinta ĈAE. La nova statuto havas tre taŭgajn paragrafojn por firmigi nian organizon en la unuopaj lokoj per kreado de lokaj grupoj, kie estas minimume 8 niaj anoj. Estas grava tasko de tiu ĉi jaro, ke en ĉiu pli grava loko aŭ en ĉiu loko, kie estas kelkaj esp-istoj, ekzistu regula nia loka grupo. Ni klopodis jam tiun ĉi jaron kaj tre faciligis tian laboron. Ni eldonis por tiu celo ciklostilitan tekston de la grupo-statuto, kiun ni disponigas por malalta sumo al interesantoj. Ankaŭ ni eldonis informilon apartan por tiu ĉi celo. La grupo en Dolní Bousov estas la unua kaj ĝis nun la sola, kreita laŭ tiu ĉi procedo. Sed kvankam la samideanoj ne ankoraŭ tro uzis tiujn ĉi faciligojn, ni kredas firme, ke dum tiu ĉi jaro ankaŭ en tiu ĉi sfero ni spertos pli viglan intereson de esperantistoj. En jaro 1936 ekzistis grupoj korporacie aliĝintaj aŭ grupoj asociaj en jenaj lokoj: Bakov n. J., Bratislava, Brno (Klubo, TRAKT), Břeclav, Č. Budějovice, Dol. Bousov, Hradec Králové, Holešov, Jaroměř, Kolín, Košice, L. Bělohrad, Lubná, Ml. Boleslav, Mnich. Hradiště, Olomouc, Pardubice, Plzeň, Praha, Přerov, Prešov, Prostějov, Mor. Ostrava, Turnov, Uher. Hradiště, Znaim, Žilina. La nombro de lokaj grupoj organizitaj estas 28, pli je 4 kontraŭ la pasinta

jaro. Tiu nombro estas tre nekontentiga. Estas nia devo voki al ĉiuj aktivaj esperantistoj en lokoj, kie ne ekzistas organizita grupo, ke ili nepre tuj entreprenu la paŝojn por ĝin fondi aŭ por ĝin aliĝi korporacie. La tasko ne estas tro malfacila, ĉar grupo povas esti akceptita jam se ĝi havas 8 membrojn. Sed tiuj 8 efektivaj membroj estas nepra kondiĉo. Bedaŭrinde kelkaj (ne tre multaj) el la cititaj grupoj ne pagis ĝis nun komplete siajn kotizojn. Ili plenumu baldaŭ nian peton kaj sian devon!

La agado de niaj grupoj estas en pluraj lokoj tre kontentiga. Por aktiva esperantisto tre edifa lego estas Lokaj informoj en nia Bulteno. Tie oni ja perceptas, ke nia movado vivas en tuta teritorio de la respubliko. Apartan mencion meritas raporto de nia plej grava loka grupo E. K. en Praha gvidata dum rimarkinda vico da jaroj de sia prezidanto, nia komitatano J. Šustr. Ankaŭ kresko de membraro en Praha estas respektinda. Al la E. K. en Košice ni sendis apartan gratulan leteron pro kresko de ĝia viveco kaj nombro de membroj post Seppik-kursoj. E. K. en Brno tre efike partoprenis Propagandan semajnon, uzante grandskale novajn niajn propagandajn afiŝojn. La E. K. en Bratislava sukcesis sen ia ajn renverso plenigi postenojn de sia komitato per novaj, tre bonaj esperantistoj, edukitaj de generacio foriranta. Ni citas diversajn ekzemplojn de la loka agado, akcentante, ke temas sole pri unuopaĵoj, ne pri kompleta nomaro.

Sed ni ne povas nefini tiun ĉi alineon per devizo: Post unu jaro ekzistu almenaŭ 8-membra grupo en pluaj 30 lokoj.

8. **Administrado de la membroj.** Ĝis fino de la jaro 1936 ĝi funkciis tre kontentige sub gvido de Oldřich Štěch. Pro lia foriro el Praha staras la komitato antaŭ la nefacila tasko trovi novan, same rapidan kaj precizan kunlaboranton. La Asocio havas la intencon transdoni la administron al administra oficejo, kies fondo estas urĝe necesa kaj tial preparata.

Ankaŭ dum 1936 ni administris la membraron de UEA. Tiu tasko estis al ni tre malfaciligita pro la sinteno de la Centra oficejo de UEA, kiu ne konsentis centrigi la membroadministron en unu loko. En sama situacio ni nun estas kun IEL, kiu ne komprenas, ke laŭ nuna maniero estas malhelpata sistema varbado de membroj kaj delegitoj kaj atingo de simila membrostato, kia estis dum la periodo Sklenčka.

S-ino Ginzová, provizora gvidantino de la membro-administro, preparis la sekvan liston pri la membroj de la Asocio en 1936:

| | |
|---|---|
| 3 | dumvivaj membroj |
| 781 | membroj pagintaj por 1936 |
| 784 | stato de la membroj la 31-an de dec. 1936 |
| 682 | " " " " 31-an de dec. 1935 |
| 102 | kresko t. e. 15·24 % (kresko en 1935 estis 2·09 %). |

Laŭloka divido de la membroj (ĉe la lokoj kun pli ol 2 membroj inter krampoj ciferoj pasintjaraj):

| | |
|---|---|
| 130 | (88) Praha |
| 82 | (42) Košice |
| 54 | (43) Brno |
| 30 | (22) Bratislava |
| 24 | (19) Mladá Boleslav |
| 23 | (30) Uherské Hradiště |
| 21 | (1) Prostějov |
| 40 | po 20 en 2 lokoj: Hradec Králové (24), Lázně Bělohrad (40) |
| 13 | (12) Mor. Ostrava |
| 24 | po 12 en 2 lokoj: Dolní Bousov (15), Lubná u Litomyšle (2) |
| 22 | po 11 en 2 lokoj: Kolín (20), Plzeň (5) |
| 10 | (10) Olomouc |
| 9 | (3) České Budějovice |
| 32 | po 8 en 4 lokoj: Jaroměř (10), Mnichovo Hradiště (9), Přerov (10), Znaim (0) |
| 7 | en Holešov (8) |
| 12 | po 6 en 2 lokoj: Břeclav (1), Pardubice (8) |
| 5 | Kukleny (0) |
| 8 | po 4 en 2 lokoj: Bystřice p. Host. (3), Kunovice (1) |
| 21 | po 3 en 7 lokoj: Česká Skalice (2), Ivančice (1), Komárno (5), Písek (2), Tisovec (3), Ústí n. L. (0), Zvolen (2) |
| 54 | po 2 en 27 lokoj: Alt-Schallersdorf, Bardejov, Beroun, Červ. Kostelec, Čes. Lípa, Čop, Jablonné n. O., Josefov, Kladno, Kralupy, Liberec, Náchod, Nový Bohumín, Nový Hradec Králové, Opava, Prešov, Příbor, Příbram, Rachovo, Spišská Nová Ves, Stará Paka, Suché Vrbno, Tábor, Teplice-Šanov, Trenč. Teplice, Zl. Moravce, Želetava, Železník |
| 163 | po 1 en 163 lokoj |
| 784 | membroj en 223 (203) lokoj de la Ĉehoslovaka respubliko. |

Ni vidas, ke ni estas sur bona vojo. Ni ree faris paŝon antaŭen kaj nia laboro dum la unuaj monatoj de la jaro 1937 estas pruvo, ke ni iris laŭ ĝusta direkto. Por la nuna jaro aliĝis bela nombro da novaj homoj, dum la ĵus pasintaj tagoj venis amase

la esperantistaro de la kongresloka regiono. Estas motivita espero, ke dum la venonta jaro ni estos jam tre proksimaj al nia celo: unuiĝo de ĉiunaciaj esperantistoj de bona volo en nia respubliko.

9. **Publika agado.** Ni transprenis de ĈAE la Bultenon kun la tre utila aranĝo kaj daŭrigis ĝian aperadon. Ni eldonis 6 numerojn, sume 48 paĝojn. La 4-a numero estis admonilo kaj ne estis numeritaj ĝiaj du paĝoj. La Bultenon redaktis D-ro Stan. Kamaryt helpata de O. Ginz kaj Vuk Echtner. La administradon kaj ekspedadon prizorgadis Fr. Slavík, kiu estis krome responda redaktoro. La Bultenon ni eldonadis ne regule, sed laŭ bezono. Ni nepre ne volas, ke ĝi estu gazeto, sed ekskluzive organiza bulteno. Ĉar kiel nacian informan gazeton ni rekomendas abonon kaj legon de Ligilo. La Bulteno kostis sume 4026 Kč.

Krom la Bulteno ni eldonis prese:

| | | |
|---|---|---|
| Statuto . . . . . . . . . | 1000 | ekz. |
| Ĉeĥa ŝlosilo, laŭnorma eldono | 10000 | „ |
| Jeden jazyk (ĉeĥe), 2-a eld. | 10000 | „ |
| An alle Freunde . . . . . | 3000 | „ |
| Germana ŝlosilo laŭnorma . . | 2000 | „ |
| Propaganda afiŝo granda . . . | 2200 | „ |
| Propaganda afiŝo malgranda . | 2350 | „ |
| Propagandaj glumarkoj . . . | 12000 | „ |

De ciklostilitaj cirkuleroj ni eldonis sume 40. (En antaŭa jaro 26.) Sumo de iliaj paĝoj estis 48. (Pasintjare 41.) El tio de Gazetara Servo 6 paĝoj. Sumo de dissenditaj ekz. estis 5230, la plej granda eldoncifero estis 680, la plej malgranda 30. Pasintjaraj ciferoj koncernaj estis 3585, 500, 26. Ankaŭ el tiuj ciferoj oni vidas daŭran kreskon de amplekso de nia laboro organiza. Ili signifas, ke ni turnas nin meze pli ol trifoje dum unu monato al niaj kunlaborantoj.

10. **Kontakto kun ĉs. oficialaj aŭtoritatoj** estis tiun jaron ankoraŭ pli vigla ol jaron pasintan. Ne temis pri principaj problemoj aŭ principaj postuloj, sed ni turnadis nin al ministerioj kaj aliaj instancoj kun konkretaj postuloj, kiuj estis plejparte plenumataj. Ni eĉ ricevis de la eksterlanda ministerio por 3 fremdaj esp-istoj senpagajn vojaĝbiletojn fervojajn. Apartan mencion meritas niaj memorandumoj al ministro **Franke**, ke li invitu nian reprezentanton en fondotan Oficon pro propagando ŝtata kaj nacia, al la ministerio eksterlanda pri bezono, ke esperantlingva propaganda materialo estu eldonata per mono ŝtata, al la ministerio poŝta kun propono eldoni poŝtmarkon kun esperanta teksto. — Nacia konsilantaro ĉs (Národní rada) mendis de ni 2 broŝurojn pri Pilsudski. — Ministerio poŝta donis specialan permeson al nia komitatano por aktive partopreni en Viena kongreso. Ministerio ricevis nian dankon pro kompreno por nia agado. — Tre grava rezulto estas dekreto de la ministerio de internaj aferoj el 17. VIII. 1936 n-ro 58.427/1936-13, laŭ kiu estas permesite al ĝendarmoj, ke ili estu niaj membroj kaj per ni ankaŭ membroj de internacia e-organizo. — Poŝta ministerio per dekreto n-ro 39.489/III-1936 el 20. VI. 1936 atentigis sian oficistaron pri specialaj kursoj poŝtistaj ĉe Cseh-instituto en Arnhem.

11. **Kontakto kun nia centra organizo.** Ni estis en koresponda rilato kun la estraro de UEA kaj informadis ĝin pri niaj vidmanieroj. En kunsidoj de UEA-komitato en Wien reprezentis nin nia prez. Kamaryt, kiu ĉeestis ĉiujn kongresajn kunvenojn. Li ankaŭ salutis la kongreson en nia nomo. En nomo de GEL parolis s-ro Gahler. Nian vidmanieron pri decidoj de Wien, pri kongresa agado kaj pri rilato UEA kaj IEL ni jam diris, ne estas bezone ripeti ĝin tie ĉi. Sed tamen ni enskribu strangan observon. Nia Bulteno enhavas ofte tre raportindajn informojn pri nia agado. Tamen ĝi malofte estas citata de niaj kolegoj. Sed kiam nia artikolo en n-ro 6. ŝajnis aludi personajn aferojn, ĝi subite estis citata, represata kaj komentariata. Tial estu tie ĉi dirite al niaj legantoj ekster nia lando: Ĝuste tial, ĉar ĉe ni ne temas pri personaj plaĉoj aŭ malplaĉoj, ni decidis rekomendi al nia membraro aliĝi grandnombre al IEL eĉ se ni ne konsentis pri la kondutmaniero de novaj gvidantoj. Sed ni scias, ke neniu inter la homoj estas perfekta, ke sufiĉas por la savo celi la idealon neatingeblan. — La kongreson en Wien partoprenis multaj niaj anoj, multaj el ili aktive. La prezidanto kaj vicprezidanto prelegis en la Somera universitato, estro de nia turista komisiono tre sukcese zorgis por turni vojaĝemon de kongresanoj en nian landon ktp. La kongresanoj nialandaj vizitis kune ĉeĥoslovakan konsulejon kaj estis tie tre afable akceptitaj. Apartan mencion meritas kunveno de kongresanoj el Ĉeĥoslovakio en Wien en ĉ. nacio domo, kiun partoprenis 40 niaj anoj kaj kiel gastoj samideanoj pola kaj hungara. La kunveno komencita per kanto de „Espero" kaj de ŝtata himno traktis pri organizaj demandoj kaj kontentigis ĉiujn.

12. **Kontakto kun ceteraj naciaj societoj.** Ankaŭ tiun ĉi jaron ni dissendis nian jaran raporton al ĉiuj naciaj societoj laŭ la listo en la Jarlibro. Ni ricevis konfirmon de tiu sendo ĉu per letero ĉu per sendo de analogia dokumento de societoj Brita, Estona, Franca, Jugoslava, Norvega, Sveda, Nord-Amerika. Krom ili ni ricevis jarraporton de Federacio de Laboristaj esperantistoj en regiono de la nederlanda lingvo. Niaj komitatanoj studis la ricevitajn dokumentojn tre atente. Ni pensas, ke ankaŭ legado de nia raporto estas utila por funkciuloj de la ceteraj naciaj societoj, tial ni ankaŭ tiun ĉi jaron dissendas ĝin kaj ni estos tre dankemaj al ĉiu societo, kiu sendos al ni sian raporton aŭ sian opinion pri tiu ĉi nia iniciato, kiun ni efektivigas jam depost jaro 1932. — Ni salutis perletere naciajn kongresojn belgan, nederlandan, jugoslavan. — De la jugoslava asocio ni ricevis proponon, ke ni dum la Wiena kongreso kunvoku la reprezentantojn de la mezeŭropaj societoj naciaj por trakti pri komuna agado kaj por interkonsenti pri la sama procedo koncerne internacian organizon esperantistan. Ni ne kunvokis tian kunvenon pro diversaj konsideroj, precipe ĉar dum la kongreso mankas sufiĉa kvieto por fari decidojn gravajn. — Tamen ni ne forgesis tiun instigon kaj revenos al ĝi. — Al Bostona E-Societo ni donis informojn pri niaj propagandmanieroj kaj instrumetodoj. Kun Norvega E-Ligo ni korespondas pri Gazetara Servo.

13. **Lernejaj aferoj** (komisionestro D-ro Kamaryt). En aprilo 1936 estis lastfoje farataj ŝtataj ekzamenoj pri Esperanto. Estis en Praha ekzamenataj 7, en Bratislava 6 kandidatoj. La samideanoj akceptu de ni sinceran dankon pro ilia oferemo, kun kiu ili obeis nian rekomendon, ke la lastaj ekzamenoj havu multajn kandidatojn. Ni studas eblecon por restarigi tiun permeson laŭ la nova ekzamena regularo de instruistoj burĝlernejaj. La afero estas malfacila. Tamen ni esperas veni al la celo. Dum la jaro venis multaj demandoj pri ebleco lasi sin ŝtate ekzameni. Se aliĝoj al ekzamenoj estus venadintaj dum la tempo, kiam institucio de ŝtataj ekzamenoj ekzistis, nia pozicio estus nun pli forta. — La lektoraj lecionoj de esp-o en la ambaŭ teknikaj altlernejoj en Praha daŭras. Tio estas la sola pozitiva fakto, pri kiu ni povas raporti kontente el medio de lerneja administro. — Japana pedagogo interesiĝis pri K o n s t a n t a  l e r n e j a  e k s p o z i c i o en Praha. Tiu institucio ricevis el Japanujo ekspozician materialon.

14. **Propagando ĝenerala.** La plej granda entrepreno en tiu ĉi fako estis invito de Cseh-metodaj instruistoj kaj prelegvojaĝo de Scherer, kiuj du entreprenoj tre streĉis niajn laborpovojn. Ni raportas pri ili en apartaj alineoj. — P r o p a g a n d a  s e m a j n o, kiun ni aranĝas regule depost jaro 1931 laŭ la sama maniero okazis ankaŭ tiun ĉi jaron en la unua semajno oktobra. Ni vidas utilecon de tiu ĉi iniciato ankaŭ en tio, ke ĝi okazas regule, dum vico de sinsekvaj jaroj, tiel, ke niaj kunlaborantoj jam scias, kiam ni turnos nin al ili kun la instiga peto. Ĉiun jaron venas respondoj el lokoj dormintaj pli frue. Ni iom miras, ke ni legis ĝis nun tre malofte pri konstanteco de tiu nia entrepreno en fremdlandaj samideanaj gazetoj. Eĉ kiam nia internacia centro akceptis en Stokholmo propagandan dusemajnon kiel oficialan propagandmetodon, ni nenion legis pri ekzemplo de ni kaj de GEL. Pri rezulto de la semajno en nia lando ni povas konstati ankaŭ tiun ĉi jaron, ke ĝi estas kontentiga, eĉ se ni ne volas kaj ne povas nomi ĝin brila. — P u b l i k a j  k u r s o j por komencantoj okazis 51 kun sume 1120 partoprenintoj. En jaro pasinta estis 64 kursoj kun 1640 kursanoj. (Ne estas kunkalkulataj la Seppik-kursoj.) Ni sendas al kursgvidantoj ciklostilitan demandaron por ricevi detalajn fidindajn informojn pri la kursoj. Tamen la ciferoj de tia statistiko ne estas absolute certaj. Sed ĉar tiu ĉi statistiko estas jam la kvara laŭ la sama metodo kaj ni venas al nombroj ne tro diferencaj, estas certe, ke la nombro de niaj samlandanoj vizitintaj dum la jaro la kurson publikan oscilas ĉirkaŭ 1200 homoj ĉium jaron. Tiu nombro ne estas alta kaj ni rekomendas rigardi ĝin sobre. Estus tre utile, scii tiajn nombrojn ankaŭ el la aliaj landoj. Kun kontento ni legis similan nombron pri Francujo el 1936. Ĝi estas duobla kompare kun la nia. En Enciklopedio sole en artikolo pri Ĉeĥoslovakujo estas tia numero. Sed en kelkaj gazetoj esperantistaj ni legas pri tiom altaj nombroj de kursanoj kaj tamen ni spertas ofte tre nesufiĉan konon de la lingvo en diversaj fremdlandaj medioj esperantistaj, ke ni tre dezirus scii interrespondajn numerojn.

Ni publikigis novan eldonon de ĉ e ĥ a  ŝ l o s i l o. Ĝi estas kvina ĉeĥa eldono, unua laŭ normo de UEA. La teksto bezonis fundan novan redakton, kiun faris St. K a m a r y t kaj O. G i n z. Ni estas nun posedantoj de la eldonrajto por la ĉeĥa kaj por la slovaka tekstoj. Ni tiun ĉi jaron presigis por ni ankaŭ laŭnorman  g e r m a n a n  e l d o-

non de la ŝlosilo, eldonitan de I. E.-Muzeo en Wien. Tiel ni ne sole disponiĝis tre taŭgan materialon al propagandantoj, sed ni povis ripeti tiun ĉi jaron la propagandan proceđon, entreprenitan pasintjare kun ŝlosilo slovaka, nun kun ŝlosiloj ĉeĥa kaj germana. Ni proponas ĝian sendon por unu Kč al legantoj de gazetoj, kiuj enpresis la koncernan artikoleton. Ankaŭ tiun ĉi jaron havis tiuj niaj ofertoj vastan resonon. — Ĝojiga fakto estas, ke nova eldono de ĉeĥa laŭnorma flugfolio jeden jazyk („Unu lingvo") estis urĝe postulata. Ni presiĝis ĝin denove en 10.000 ekz. kaj tre rekomendas ĝian uzon al ĉiuj samideanoj. Teksto estis nove redaktita de O. Ginz. — Nia adresaro de interesantoj pri la movado estas daŭre konservata kaj kompletigata. Ŝajnas al ni, ke nun jam pluraj laborantoj komprenas gravecon de tiu ĉi adresaro, ĉar ni pli ofte kaj pli spontanee ricevas listojn de la homoj, kiuj en diversaj medioj kaj lokoj ekinteresiĝas pri esp-o. Ĉiuj, kiuj helpis kaj helpos al ni en tiu grava metodo teni la intereson de homoj, kiuj nur transire venis en niajn vicojn, ricevu de ni apartan dankon. Aparte estu menciita E. K. en Bratislava, kiu sendis al ni nomaron de 200 adresoj jam pretan por surgluo. — La eldono de afiŝoj kaj glumarkoj trovis vastan aprobon. La tre efika bildo kaj tre taŭga formato plaĉas al ĉiuj. La glumarkoj estis disvenditaj komplete dum kelkaj semajnoj. Ankaŭ la afiŝoj estas kontentige disvendataj. Ni proponis liveron de la afiŝoj ankaŭ al kelkaj naciaj societoj kaj grupoj eksterlandaj. Per aparta cirkulero ni anoncis al lokaj grupoj kondiĉojn pri la livero de afiŝoj kaj ni turnas ilian atenton al tiu cirkulero ankaŭ sur tiu ĉi loko, ĉar ne ĉiuj grupoj jam posedas tiun eminentan propagandilon. — Donaci lernolibrojn kaj alian propagandan kaj dokumentan materialon ni havis dum tiu ĉi jaro relative oftan okazon. Ni ĝin uzis nur, se temis pri personoj iel eminentaj aŭ influaj. Estus utile pli uzi tiun manieron por influi personojn iel gravajn. — Teksto de propaganda prelego estas je dispono de interesantoj. Ĝi ankaŭ dum tiu ĉi jaro estis malofte demandata. — Niaj flagoj ne estis uzitaj dum la jaro. — Demandoj petantaj informon pri internacia lingvo venas relative ofte. Bonajn servojn por respondo donas aparta nia ciklostilita letero, kiun ni sendas kun diversa materialo. — Aperis dum la jaro nova lernolibro kaj popola vortareto de nia komitatano J. V. Šamla. Li aperigis ilin en granda ĵurnala eldonejo Moravské nakladatelství en Brno. La eldonejo organizis en sia taĝĵurnalo Moravské noviny enketon inter konataj personoj pri esperanto; ĝiaj rezultoj aperis jam trifoje kaj ilia publikigado estos daŭrigata. La sama eldonejo dissendis demandarojn por kolekti adresojn de esperantistoj el Moravio kaj rezultis el tio adresaro de unu mil adresoj. Simile estis aranĝita kalkulado de esp-istoj en Moravio. La eldonejo donis grandan publikecon al artikoloj, artikoletoj kaj rubrikoj priesperantaj en ĉiuj siaj gazetoj Moravské Noviny, Moravská Orlice, Proud, Kulíšek. Tio ĉio estas redaktata kaj plejparte verkata de J. V. Šamla kaj s-ino Strejčková. La eldonejo presis afiŝojn por esperanto-kursoj kaj sendas ilin senpage al petintoj. Ĝis nun oni dissendis ĉirkaŭ unu mil ekzemplerojn. Ankaŭ en Brno aperis nova negranda vortareto ĉeĥa-esperanta de Aleš Berka en privata eldonejo. La lernolibro de nia komitatano T. Kilian aperis nunjare jam en tria eldono. La unua vortaro slovaka-esperanta de ano de nia kontrola komisiono J. V. Dolinský estas jam presata. Ni akceptas antaŭmendojn po 16 Kč. Ankaŭ presata estas nova lernolibro por slovakoj de A. Macek, konata laboranto inter katolikoj kaj skoltoj. Lia lernolibro aperos en eldonejo de la plej granda eldonanto kaj disvastiganto de slovakaj libroj Spolok sv. Vojtecha en Trnava. Tiuj du libroj signifos grandan apogon por nia movado inter slovakoj.

15. **Cseh-metodaj instruistoj** Henriko Seppik kaj Erika Seppik, kiujn ni invitis en komenco 1936, laboris en Košice, Prostějov, Olomouc, Uherské Hradiště, Josefov-Jaroměř, Moravská Ostrava. En tiuj lokoj estis sistemaj kursoj Cseh-metodaj. Krome ili havis multajn provlecionojn kaj prelegojn geografiajn. Pri detaloj estis kaj estos ankoraŭ raportite sur alia loko. Sed tie ĉi ni ripetu, ke ĉie la sukceso estis evidente bona. Invito de Cseh-metoda instruisto signifis ĉie gravan faron propagandan kaj samtempe varbon de novaj membroj por la loka klubo. Ankaŭ ebleco aranĝi perfektigan kurson, kiun la samideanoj efektive vizitas kiel kursanoj, estas tre utiliga fakto por la movado. La veno de tia instruisto en iun urbon povas esti signata per du vortoj: Eklerni! kaj Ellerni! Ni uzas la okazon por esprimi al sinjorino Erika Seppik kaj al sinjoro Henriko Seppik nian dankon pro la sindono, kiun ili dediĉas al sia tasko.

16. **Scherer-prelegvojaĝo.** J. R. Scherer estis en Ĉeĥoslovakio dum januaro-februaro 1937. Li prelegis en 20 lokoj. Detala raporto estas donata aparte. Tie ĉi estu dirite, ke ankaŭ tiu aranĝo havis grandan signifon propagandan kaj instigan en ĉiuj lokoj, kie li prelegis. En Praha mem estis 4 liaj prelegoj.

Ni esprimu tie ĉi dankon al la lokaj agantoj, kiuj ne timis la laboron bezonan por aranĝo, kaj invitis ĉu Seppik, ĉu Scherer. Ambaŭ vojaĝojn, tiun de Seppik kaj tiun de Scherer organizis nia kasisto Friedrich. Estu tie ĉi esprimita danko al Friedrich ne sole de ni, asocia estraro, sed ankaŭ de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj, al kiuj li donis dum tiu jaro malofte troveblajn eblecojn de laboro por esperanto samtempe propaganda kaj organiza.

17. **Propagando per gazetoj.** (Komisionestro O. Ginz.) Pri la nunjaraj rezultoj ni estas sufiĉe kontentaj, kvankam ni konscias, ke estis atingebla pli multo. Estas precipe Bohemio kun escepto de Praha kaj Plzeň, kie devas esti la laboro pli intensa. Se ni tie sukcesos — kaj ni povas per ioma fortostreĉo de ni kaj de kunlaborantoj bohemiaj — tiam estos la publiko de nia ŝtato informita tre komplete pri nia movado. Grava helpo estas por ni la ĉiama aktiveco de s-ino Šupichová, kiu dum la jaro 1936 publikigis mem 112 artikolojn. Por germanlingvaj gazetoj de nia respubliko ni aranĝis nun specialan Servon gvidotan de s-ro Donner. La suba statistiko preparita de s-ro M. Staněk pruvas, ke nesufiĉa laborforto de iuj ne estas rimarkebla pro bonegaj rezultoj de aliaj. Danke al ili ni alvenis dum la jaro 1936 al la bela cifero de 2150 artikoloj, kiuj venis en niajn manojn. Ĝi estas plej alta nombro atingita ĝis nun de nia Gazeta Servo. Se ni sobre kalkulas, ni konstatos, ke almenaŭ 4 milionoj da gazetekzempleroj alportis dum nuna jaro artikolon pri nia lingvo. Sed ni celas ankoraŭ pli alten kaj esperas trovi komprenon ĉe niaj kunlaborantoj.

Jen la detaloj pri 1936 (inter krampoj tiuj pri 1935).

| Publikigis gazetoj | | | artikolojn: | |
|---|---|---|---|---|
| 97 | (106) | en Praha | 582 | (468) |
| 64 | (67) | en cetera Bohemio | 306 | (524) |
| 64 | (48) | en Moravio-Silezio | 699 | (399) |
| 35 | (33) | en Slovakio, Subk. R. | 182 | (109) |
| 10 | (3) | ĉsl. ekster respubliko | 31 | (5) |
| 55 | (55) | germanlingvaj en ĈSR | 350 | (261) |
| 325 | (312) | gazetoj | 2150 | (1766) |

18. **Propagando en fakaj rondoj.** Al Ligo de universitataj unuiĝoj por Ligo de nacioj (Svaz vysokoškolských sdružení pro Společnost národů) en Praha ni sendis tradukon de la rezolucio akceptita de la brita delegitaro por la tutmonda packongreso en Genève. Per la letero el 3-a de novembro la nomita ligo informis nin, ke ĝi subtenas la rezolucion kaj ke ĝi anoncis sian konsenton senpere al Londono. — Ni estas reprezentitaj en Ĉs komitato por organizo de la paco (Čs mírový akční výbor), kien ni delegis s-on Vavrovský. — Ni estas depost ĝia fondo anoj de unuiĝo de gravaj progresemaj kaj pacifismaj societoj Rada obrodných organisací kaj pagis membran kotizon ankaŭ por tiu ĉi jaro. — En instruistaj fakaj kaj sindikataj gazetoj estas oftaj informoj kaj artikoloj pri esp-o. En List říšského svazu učitelek estis rubriko de Šupichová „El esperanto-mondo" kvinfoje. En bulteno de Centra societo de instruistaj unuiĝoj en lando Moravi-silezia aperas regule rubriko redaktata de fakinstruisto Bláha. En Měsíční zpravodaj aperas rubriko de Šupichová „Per esp-o en la mondon" en ĉiu numero. Neregulaj artikoloj pri esp-o aŭ pri temoj koncernantaj nian movadon aperis preskaŭ en ĉiuj instruistaj aŭ pedagogiaj gazetoj ĉeĥoslovakaj. Nia komitatano T. Kilián estas reprezentanto de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj. — Inter kuracistoj laboras niaj membroj MUDr. Marek el Ml. Boleslav, kiu en la ĥirurgia kongreso en Bratislava citis en sia raporto ankaŭ esperant-lingvan literaturon medicinan, kaj MUDr. Fr. Vaněk el Dolní Bousov. Aparte grava faro estas, ke nove fondita Lékařská revue (Kuracista revuo) en Praha, redaktata de MUDr. Boh. Pour, komencis envicigi esperantlingvajn resumojn de la fakartikoloj. Ni diskonigos tiun fakton laŭ ebleco. — Ni sukcesis ankaŭ tiun ĉi jaron doni aŭ ricevi gravajn informojn pri komercaj aferoj. Al E-Asocio de Norda Ameriko ni povis doni informojn pri financaj aferoj. Al Hradec Králové ni donis detalojn pri dogano ĉe japanaj varoj. Informoj pri ĉs ŝpinejoj estis de ni senditaj al Schruntz en Vorarlberg. Ni sukcesis peradi gravan informon pri reprezento de ĉs fabrikoj en Warszawa; societo de ĉs teks-industriistoj raportis pri tiu fakto en sia oficiala bulteno. Ni daŭrigis en perado de traktadoj pri aĉeto de hotelo en Monaco. — En gazeto de fervojistoj „ČSD-Zpravodaj zamestnancov" en Bratislava daŭras unupaĝa rubriko, redaktata de nia ano

Charvát. Ni esprimis nian gratulon kaj dankon pro tiu aranĝo al Direkcio de fervojoj en Bratislava. — Kun katolikoj-esperantistoj ni estis en daŭraj rilatoj precipe pro la kongreso en Brno. Ni publikigis en Bulteno la informon pri invito al kongreso, nia tre aktiva komitatano Vondroušek estis inter la ĉefaj kongresaj laborantoj en Brno, ni pruntis por la ekspozicio grandan parton de materialo, sekretario de Ligo de katolikaj esp-istoj Fr. Buhr estas nia vickokomitatano. Raporto pri kongreso en Brno estas sur p. 38. — Al skoltoj ni dediĉis ĉiun eblan intereson. Ni kreis apartan komisionon kun Fr. Buhr kiel estro. Sur p. 41 ni publikigis alvokon de SEL-ano. Kun prezidanto de Skolta Ligo Murphy ni korespondis pri tendaro en Ipswich, pri vizito de skoltoj al Ĉeĥoslovakio, sendis al li gvidlibrojn, informis pri tio ĉ. Skoltan asocion. Sed pozitivan sintenon al esperanto ni povas konstati sole ĉe Centro de slovakaj katolikaj skoltoj (Bratislava, Svoradov). Ĝia vicprezidanto Dr. K. Körper parolas esperanton, sekretario JUC. A. Macek estas aktiva esp-isto. Estis organizitaj multaj kursoj ĉe skoltaj trupoj en tuta Slovakujo. Kompreneble ankaŭ inter skoltoj ne ĉiuj kursanoj restis fidelaj al la lingvo. Tamen post kursoj en 14 urboj restis ĉ. 60 skoltoj kaj skoltinoj uzantaj esperanton en siaj internaciaj rilatoj. Centro de k. sl. skoltoj gastigis jam 3 foje nederlandan skoltonesp-iston redaktoron Wim van Heugten. Organo de slovakaj skoltoj Skaut presas en ĉiu numero esperantlingvan resumon de la enhavo kaj krom tio enhavas oftajn slovakajn artikolojn pri nia movado. La resumo havas praktikan kaj propagandan signifon samtempe, ĉar la revuo estas dissendata fremdlanden al diversaj redakcioj. — Pri sukceso de la krucvortenigmo ni raportis sur p. 39. Estu tie ĉi aldonite, ke E. K. en Praha sendis al 200 solvintoj loĝantaj en Praha inviton al sia publika kurso, proponante al ili rabatitan prezon por la kurso.

19. **Propagando fremdlanden.** Laŭ iniciato de Aŭstria E-isto ni sendis leteron al aŭstria ministro Stockinger. Al Internacia Pedagogia Servo en Moskva ni sendis informojn pri uzo de fotoj, diapozitivoj, filmoj, radio en lernejoj. Al Debreczen ni sendis informojn pri nialandaj leĝaj normoj pri privatklinikoj kaj sanatorioj. Kun interesantoj en Tallinn ni korespondis pri Welzl, arkta poŝto, poŝta muzeo. Pri Olimpiaj ludoj en Tokio ni korespondis kun E-Instituto Japana. Fotoj kaj kartoj el Praha estis senditaj al petintaj svedaj knaboj kaj knabinoj. Ni respondis al cirkulero de ILEPTO kaj sendis al ĝi informojn pri niaj agadmanieroj. Al Berlin ni sciigis informojn pri esperanto-poŝtstampiloj. Ni helpis serĉi kaj trovi nehonestan filateliston. Al niaj membroj ni povis liveri adresojn de fremdlandaj korespondantoj. Ankaŭ tiun jaron ni klopodis konfirmadi regule ricevon de esperantlingvaj presaĵoj venantaj el fremdlando.

20. **Radio** (komision-estro J. V. Šamla). E-disaŭdigoj okazis dum j. 1936 14 foje el Brno, 4 foje el Košice, 27 foje el Mor. Ostrava. Brno estis relajsata de Praha I. kaj Mor. Ostrava. En la programoj el Brno estis 6 dramoj, 2 kabaredoj, 1 opereto, 1 kongresmalfermo, 35 kantoj, 1 koncerto. En aprilo-majo estis el Brno disaŭdigata kurso de T. Kilián, dufoje semajne. Krome estis el Brno 8 foje pli longaj disaŭdigoj en ĉeĥa lingvo, koncernantaj niajn movadon kaj organizon. Nia kasisto Friedrich proponis al stacio en Košice, ke ankaŭ ĝi enkonduku regulajn prelegojn en esp-o. La prezentadoj de TRAKT-anoj estas daŭre eminentaj. La Brno-stacio eldonis ciklostilitan, nun presitan Ĉeĥoslovakan Radio-Bultenon redaktatan de Dalibor Chalupa.

21. **Turismo** (komisionestro Robert Bloch). Tiun ĉi jaron estis la agado de nia centro ankoraŭ pli intensa kaj pli ampleksa, ĉar la Neŭtrala E-centro ĉesigis sian funkciadon kaj ĝia posedanto akceptis funkcion de estro de nia turisma komisiono. Ĉar la centro dediĉis sin plej intense al turismaj servoj, estas raporto ankoraŭ pli ampleksa ol estis antaŭ jaro. La nombro de akceptitaj turistoj-esperantistoj kreskis ankoraŭ dum tiu ĉi jaro. Ni akceptis en majo karavanon de Nederlandaj fervojistoj, kiu vizitis Prahan (gvidis ĝin s-o Bobula), Karlštejn, Brno, Košice. En junio venis karavano de nevidantaj esp-istoj el Jugoslavujo, gvidita de direktoro Ramadanovič; en julio karavano de 50 svedoj, gvidita de Malmgren el Stockholm, post la Wiena kongreso venis aŭtobuse karavano de estonoj. Dum la sama tempo venis ankaŭ karavano de samideanoj Danaj el Aarhus. Gvidis ilin s-o Koudela. Precipe grava inter tiaj karavanaj vizitoj estis grupo de 20 universitataj studentoj el London, gviditaj de sia profesoro Fawcett, kiu venis por studi folklore kaj geologie regionon de Nízké Tatry kaj laboris en Telgárt. Profesoro Fawcett korektis propagandan turistan anglalingvan broŝuron pri Slovakujo, eldonitan de Slovaka porfremdula

asocio. Ni transdonis tiun korektitan ekzempleron al la nomita asocio por vidiĝi al ĝi, kiom malfacile estas liveri fremdlingvan materialon turistan en lingvaĵo korekta. Unuope venantaj turistoj-esp-istoj estis tre multaj. Tie ni citu sole kelkajn: D-ro Kao, ĥina katolika pastro, ricevis por sia vojaĝado tra Ĉeĥoslovakujo, dum kiu li faris multajn vizitojn kaj prelegojn en diversaj lokoj, senpagan fervojbileton pro nia interveno. Jakobi-Sikman el Johanesburg (Sudafriko), sinjorino kaj fraŭlino Bengtsson el Halsingborg (Svedujo), Hans Jakob el Genève, geŝinjoroj Hornblow el New-Zeeland. Por Wienaj kongresanoj ni prizorgis legitimilojn por rabatita vojaĝo tra nia respubliko. Koncernis 30 homojn plejparte el Polujo. Laŭ diversaj petoj de fremdlandaj travojaĝantoj ni reklamaciis ĉe ministerio diversajn fervoj-rabatojn sensukcese. Sed dum la Wiena kongreso ni (per interveno de Bloch) sukcesis ricevi en nia konsulejo senpagan vizon precipe por poloj vojaĝontaj trans nia respubliko. — Fervoja ministerio donis laŭ niaj koncernaj petoj senditaj al ĝi kaj al ministerio fremdlanda 25 % rabaton al kongresanoj de Wien kaj de Warszawa travojaĝantaj nian landon. — En la jarlibron 1937 de entreprenoj interesantaj por turistoj, eldonatan de Komerca ministerio, ni enskribigis la Libertempejon en L. Bělohrad. — Ni uzadis niajn interrilatojn kun fremdlandanoj por d i s d o n o d e p r o p a g a n d a m a t e r i a l o t u r i s m a. Precipe ni eluzis kongreson Wienan; por tiu okazo donis al ni ministerioj komerca kaj fervoja grandan kvanton de materialo, kiun ni ĉiun povis transdoni en manojn tre utilajn. Sed ankaŭ aliajn okazojn ni uzadis por tiu ĉi celo. Ekzemple ni donadis kiel konfirmilon ĉe la konkurso por legintoj de la Ĉ. Antologio esperantlingvajn prospektojn turistajn. Ni en 9 esper. gazetoj invitis kongresontojn en Wien, ke ili vizitu ĈSR kaj petu de fervoja ministerio turistan esperant-lingvan materialon. Propagandan esp-o-materialon turistan ni sendis al Kraków (Polujo), al Sobe Keugo (Japanujo), al aŭtomobila klubo en Locarno, al turistaj unuiĝoj en Svedujo kaj Danujo kaj al multaj unuopaj interesuloj. Petoj pri tiaj gvidiloj kaj prospektoj venas relative ofte. Bedaŭrinde ĝis nun ne ĉiuj korporacioj eldonintaj esperantlingvajn varbilojn, disponigas ilin al ni en sufiĉe granda kvanto, por ke ni povu dissendadi ilin laŭcele. Tial ni jam konsilis al la tradukantoj kaj al la eldonantoj, ke ili pli uzu tiun eblon de ni disponigatan. Kaj ni ripetas nian konsilon ankaŭ sur tiu ĉi loko. De oficiala itala oficejo turisma ENIT ni ricevis provizon de turistaj presaĵoj, kiujn ni povis disdoni al tre taŭgaj adresoj. — Al ministerioj fervoja kaj eksterlanda, al urbestraro de Praha, al Porfremdulaj asocioj en Praha, Brno, Bratislava ni sendis informojn pri vizitoj de esp-istoj, iliaj opinioj pri aranĝoj, eltranĉaĵojn el fremdaj gazetoj, en kiuj ili skribis pri siaj vizitoj. Al ministerio komerca ni sendis dokumentitan memorandumon pri nia turisma agado. — Planita k a r a v a n o t r a A ŭ s t r i o ne efektiviĝis, kvankam venis demandoj de 30 interesuloj. Tamen ĉeesto de komisionestro en Wien estis tre utila, ĉar li sukcesis turni multajn vojaĝemulojn al nia lando. — E-lingvaj g v i d f o l i o j aperis dum 1936 tri (v. p. 38). Precipe la „Grotoj" (tradukitaj de R. Bloch) dissenditaj de la Turista Klubo por recenzo al e-gazetoj, havis bonan resonon kaj la Turista klubo ricevis multajn petojn. Estas grave konstati, ke dum vico de jaroj ni ĉiam povas raporti pri apero de kelkaj gvidfolioj kaj gvidlibroj. Ankaŭ tiu fakto pruvas komprenon pri rolo de nia lingvo kaj organizo. — Internacia s o m e r r e s t a d e j o en L. B ě l o h r a d funkciis ankaŭ dum tiu ĉi jaro. Ni rekomendas tiun ĉi tre simpatian kaj utilan entreprenon ankaŭ al niaj membroj.

22. **Stacidomaj tabuloj** pendas en ĉ. 80 stacidomoj. La listo ne multe kreskis kompare kun la pasintjara. Tial ni ne ripetas ĝin. Ni turnas la atenton de samideanoj al uzo de la tabuloj sur iliaj klubejoj. Por 15 Kč pendos sur taŭga loko tre efika kaj daŭra propagandilo.

23. **Informado de fremdlando pri niaj nacio kaj ŝtato.** Ni sendis informon al Kontraŭrevizia Ligo en Rumanujo. Kun sveda muzikkomponisto Tord Bene ni traktis por enmeti en la planatan serion de gramofondiskoj ankaŭ muzikon de ĉeĥoslovakaj aŭtoroj. Al Funchal (Madeira) ni prizorgis datojn pri ĉeĥoslovakaj muzikistoj por preparata enciklopedio portugallingva. Al Limoges ni sendis tre diverspecan materialon por ĉeĥoslovaka vespero. Por Svedujo ni prizorgis diapozitivojn pri Praha. Niaj membroj ofte havis la okazon por informi fremdlandanojn pri niaj politikaj vidmanieroj kaj situacio.

24. **Literaturo** (komisionestro Dr. T. Pumpr). La Ĉ. A n t o l o g i o ankoraŭ dum tiu ĉi jaro estis instigo por tre efika pro-

pagando. Ni povis donaci ĝin al pluraj gravaj redakcioj por vidi kaj por recenzi. Ni korespondis kun pluraj eminentaj verkistoj pri la recenzoj presitaj aŭ skribitaj (Durych, Halas, Vachek). Tiajn korespondaĵojn ni adresis al la verkistoj per iliaj eldonejoj, kio certe ankaŭ signifas specon de influo. Aperis en ĉsl. gazetoj sufiĉe multaj informoj pri tiu verko. — Ankaŭ opajn kajerojn de Literatura Mondo ni povis donaci al kelkaj gravaj interesuloj pri literaturo. — Ni donis 200 Kč kiel premion por konkurso inter la legintoj de la Antologio. La konkurso estis publikigata en Lingvo-Libro. Vidu pri ĝi sur p. 38. La rezulto de la konkurso estos baldaŭ publikigita. — La listo de verkoj tradukitaj el ĉeĥoslovaka literaturo estas daŭrigata, sed la kunlaborantoj ne anoncis sin. Depost la lasta raporto neniu trovis utile proponi sian kunlaboradon por tiu ĉi tre interesa tasko. — Nia kunlaborado kun Moraviaj Esperanto-Pioniroj estis ankoraŭ pli vigla tiun ĉi jaron, ni klopodadis kun sukceso disvastigadi librojn de ili eldonitajn. Ilia persisto ebligis, ke ekzistas jam tre bela vico de tradukoj el nia literaturo. Inter 20 tiaj libroj ĝis nun aperintaj estas 10 eldonitaj de Mor. E.-Pioniroj. — En kunmeto de la listo de la Esperanto-bibliotekoj en nia lando ni daŭrigis. Unua aldona listo estas sur p. 38. „Lingvo-Libro" en sia Revuo de revuoj en n-ro 2 (j. 1936) aludas nian pasintjaran tabelon per jenaj vortoj: „Laŭ tio la E. K. de Praha havas 1350 Esp. librojn kaj tri grupoj havas pli ol 400 librojn. Estus ja interese vidi tiajn statistikojn kaj konvinkiĝi, kiel statas la bibliotekaj aferoj en la aliaj landoj. Tamen prefere ni ne faru! Ni timas, ke ni malgajiĝus." Ni uzas tiun laŭdon de nia literatura faka gazeto por denove insisti sur tiu ĉi loko pri graveco de postulo, ke ĉiu loka grupo posedu grupan bibliotekon. Ĝi estas ankaŭ unu rimedo por varbi kaj neperdi la membrojn. — Ankaŭ dum tiu ĉi jaro ni klopodis varbadi anojn al AELA. Tro malrapida aperado de libroj certe ne tro bone efikas koncerne varbadon. Sed la kvalito de la verkoj restas daŭre unuaranga. Tial ni ankaŭ dum tiu ĉi jaro sukcesis varbi kaj konservi konsiderindan nombron de AELA-anoj. — En literaturaj gazetoj Naše kniha (Nia libro) kaj Rozhledy po literatuře a umění (Rigardoj sur literaturon kaj belarton) aperis 3 foje raportoj de Šupichová „Novaĵoj el E-Literaturo". — La komisiono posedas tradukojn de la poemoj de K. H. Mácha, Majo kaj de K. Havlíček, Bapto de sankta Vladimiro. Ni traktas pri eldono almenaŭ de unu el tiuj poemoj. — Al Havlíček-Muzeo en Borová ni donacis foliojn el Ĉ. Antologio kun traduko de la dua ĉapitro el „Bapto de sankta Vladimiro".

25. **Libro-Servo** (estro Fr. Slavík). Atendatan disvastiĝon kaj pli bonan financan rezulton ni ne atingis. Ofte ni havis okazon konsili kaj peradi aĉeton de lernolibroj kaj abonon de fremdlandaj gazetoj. Ni intencas eldoni nomaron de literaturo plej ofte mendata. Tian liston oni sufiĉe ofte postulas de ni. Ni ĉiam esperas, ke intereso pri esperanto-literaturo kreskos inter nia membraro kaj ke la anoj komprenos, ke uzante nian Servon ili subtenas sian asocion. Se nia supozo ne efektiviĝos, ni transdonos la Libro-Servon al iu faka komercisto. Ne grandan gajnon ni transdonis al la Asocia kaso por konto de Bulteno.

26. **Sciencaj aferoj** (komisionestro Kamaryt). Ni klopodas pri esperantlingvaj tekstoj en la filmon pri Radiumo. — Ni legis manuskripton de artikoloj pri internacia lingvo por esperanta pedagogia enciklopedio. — Kun eminenta germana esperantisto ni korespondis laŭ lia iniciato pri lingvaj detaloj en nia Bulteno. — Tradukon de fakesprimoj ni sendis al Broumov. — Nia Libro-Servo estas paĝejo de I. Scienca Asocio E. Por revivigi la intereson pri ĝia Bulteno kaj pri Medicina revuo, ni eldonis apartan cirkuleron kaj sendis ĝin al tiuj niaj membroj, ĉe kiuj ni povis atendi intereson pri tiu sfero de aktiveco. Ni eĉ sur tiu loko atentigas pri graveco, ke ankaŭ inter nialandaj samideanoj ekzistu areto sufiĉe grandnombra inter anoj de Scienca Asocio. — Klopodojn pri aferoj de lingva normigo ni ne ĉesigis, ni kreis apartan komisionon (estro Mr Fr. Höfert), kiu studas la problemojn. Dr. Kamaryt havis en Wien okazon persone aŭdi opiniojn de Dr. E. Wüster.

27. **BES-Adresaro** estas depost tiu jaro entrepreno aliĝinta al nia Asocio. Nova volumeto espereble baldaŭ aperos. Ni studas eblon, ĉu en iu jaro ne povus en ĝi aperi nomaro de niaj membroj.

28. **Junularo** (komision-estro V. Echtner). La komision-estro respondis 28 korespondaĵojn de diversa enhavo, sed ne povis tro dediĉi sin al tiu ĉi agadkampo, kvankam ĝi estas tre promesa kaj malzorgita. Tre dezirinda estus skriba kurso aparte por infanoj. Ni korespondis pri junularaj gastejoj kun Anglujo (A. C. Oliver) kaj kun Verband deutscher Jugendherberge.

# Financa raporto pri 1936.

I. administra jaro de EAĈSR.

| | Aktivoj Kč | h | Pasivoj Kč | h |
|---|---|---|---|---|
| **Ferma bilanco:** | | | | |
| 1. Mono en la kaso | 38 | 80 | | |
| 2. Mono en la poŝta ŝparkaso | 1187 | 80 | | |
| 3. Mono en Občanská záložna en Košice | 3613 | 60 | | |
| 4. Inventaro (post depreno de la amortizo) | 460 | — | | |
| 5. Diversaj entreprenoj | 13181 | 55 | | |
| 6. Diversaj debitoroj kaj kreditoroj | 3283 | 05 | 2459 | 65 |
| 7. Fondaĵo ekzamena . . . Kč 488·60 | | | | |
| „ oficeja . . . „ 2.673·30 | | | 3161 | 90 |
| 8. Transitivoj | 114 | 30 | | |
| 9. Ŝuldo al UEA | | | 4251 | 90 |
| 10. Ŝuldo al IEL | | | 237 | — |
| 11. Asocia kapitalo la 1. I. 1936 . . . Kč 10.140·25 | | | | |
| Bilanca gajno . . . „ 1.628·40 | | | 11768 | 65 |
| | 21879 | 10 | 21879 | 10 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | 11492 | — |
| 2. Procentaĵo pro enkasigado de UEA-kotizoj | | | 1215 | 30 |
| 3. Diversaj entreprenoj | | | 1744 | 40 |
| 4. Elspezoj de administrado | 5913 | 25 | | |
| 5. Elspezoj de propagando | 6022 | 45 | | |
| 6. Diversaj elspezoj | 127 | 60 | | |
| 7. Amortizo de inventaro | 760 | — | | |
| 8. Bilanca gajno | 1628 | 40 | | |
| | 14451 | 70 | 14451 | 70 |

En Košice la 31-an de decembro 1936. JOSEF FRIEDRICH, kasisto.

## Nia regula kongreso en Moravská Ostrava

la 27-an kaj 28-an de februaro 1937 estis tre bone preparita de lokaj esperantistoj gviditaj de Inĝ. L. Krajc, kiuj meritas sinceran dankon pro bone farita laboro. La urbon ornamis niaj novaj afiŝoj grandaj kaj malgrandaj, kun surpresita teksto pri la kongreso.

### Amika vespero

la 27-an je la 20,30 horo en hotelo Brioni kunvenigis pli ol cent partoprenantojn. Prezidanto Dr. Kamaryt en sia enkonduka parolado komencigis diskuton pri la du specoj de niaj aktualaj problemoj: 1. Kunigo de ĉiuj aktivuloj nialandaj en unu nacia centro. 2. Estiĝo de la du centroj internaciaj UEA kaj IEL. Sekvis pri ĉiuj aluditaj aferoj vigla diskuto sincera kaj amika. Partoprenis ĝin Friedrich, Kotoulek, Neužil, Šustr, Krysta, Ginz, Krajc, Vaněk, Rosa, Heikenwälder kaj aliaj. Samideanoj, kiuj malofte havas okazon priparoli niajn aferojn organizajn persone, uzis ĝin abunde. Ĉeestintaj funkciuloj havos multan profiton el tio, kion ili aŭdis, same kiel la aŭskultintaj kaj neparolintaj samideanoj. La diskuto tre bone preparis agadon por morgaŭ, ĉar oni multon povis simple resumi en deklaroj kaj rezolucioj akcepteblaj de ĉiuj.

### Agado de regula kongreso de EAĈSR.

en Moravská Ostrava en Nova urbodomo la 28-an de februaro 1937, 9,30—13,30 h. Ĉeestis 122 personoj, kiuj reprezentis 290

membrojn el Bohumín, Bratislava, Brno, Břeclav, Český Těšín, Dolní Bousov, Dolní Lištná, Frýdek, Fryštát, Horní Bludovice, Horní Suchá, Hradec Králové, Hulváky, Karvinná, Kopřivnice, Košice, Kunčičky, Lichnov, Lučenec, Ludgeřovice, Mariánské Hory, Mievlice, Místek, Moravská Ostrava, Nové Zámky, Nový Bohumín, Nový Jičín, Olomouc, Opava, Píšť, Poruba, Potštát, Praha, Prostějov, Příbor, Přívoz, Radvanice, Rumburk, Říčany, Slezská Ostrava, Spišská Nová Ves, Stará Slezská Ostrava, Stonava, Stará Suchá, Střelice, Sviadnov, Svinov, Třinec, Uherské Hradiště, Valašské Klobouky, Vítkovice, Vratimov, Vrutky, Žáblatí, Znojmo. Sume el 55 lokoj.

Malfermante la kunvenon la prezidanto ĉeĥlingve salutis la kunvenintojn kaj reprezentanton de la urbo anon de la urbestraro s-ron A. Zelenka. S-ro A. Zelenka dankis pro la saluto kaj akcentis la pacan ideon, kiu estas ofte kunigata kun esperantismo. La prezidanto dankis la urbestraron kaj ĝian reprezentanton pro la afabla sinteno kaj senpaga disponigo de la halo kaj transdonis al s-ro Zelenka ekzempleron de Ĉeĥoslovaka Antologio, kiun donacis al la urbestro la Klubo de ĉeĥaj esp-istoj en Mor. Ostrava. Urbestrarano Zelenka restis ĉe la prezida tablo observante la esperantlingvan agadon de la kunveno.

Salutojn al la kunveno diris: P. Novotný el Nový Jičín (Ligo de Katolikaj Esperantistoj), L. Krysta el Č. Těšín (Regiona E. Ligo), Kotoulek el Nové Zámky (E. Rondo Amika), R. Vilémová el Uh. Hradiště (Slovaka E. Klubo), Fr. Heikenwälder el Prostějov (redakcio de Ligilo, Klubo).

Salutaj leteroj legitaj de Inĝ. Krajc venis de Aŭstria E. Asocio en Wien, Laborista E. Asocio en Warnsdorf, grupoj en Bardejov, Jaroměř, Nové Zámky, Praha, Přerov, Tisovec, samideanoj Borovka, Čejka, Donner, Karger, Strejčková, Šamla, Šupichová, Ultman. Antaŭ la tagordo anoncis la prezidanto proponon de komitato sendi saluttelegramon al prezidento Beneš. La propono estis akceptita aklame kun granda aplaŭdo.

1. *Protokolo pri la fonda kunveno* en Brno ne estis laŭtlegita, ĉar la kongreso aklame konsentis aprobi ĝin tiel, kiel ĝi estis presita en Bulteno 1935 p. 42—43.

2. *Raportoj pri agado kaj pri la kaso.* Parton de raportoj ricevis la kongresanoj presitan, la ceterajn redonis la prezidanto laŭ la presita teksto, publikigita en tiu ĉi numero. La diskuto koncernis la sekvajn alineojn.

a) Lokaj grupoj. La prezidanto salutis aparte prezidanton de Regiona Esperantista Ligo L. Krysta kaj ceterajn ĝiajn ĉeestantajn funkciulojn kaj dankis ilin pro la saĝa decido de ilia ĝenerala kunveno de 10-a de januaro, laŭ kiu REL aliĝis korporacie al nia Asocio. Tiu faro signifas, ke nun jam ĉiuj gravaj organizoj esperantistaj eniris en unu centron, escepte GEL. Tiu grava kaj ĝojiga rezulto signifas por ni devon plidensigi reton de niaj lokaj grupoj. Tial ni ripetas la devizon diritan jam en la invitaj vortoj de la unua numero de la Bulteno: En la jaro 1937 ni fondu novajn grupojn en pluaj 30 lokoj! Parolis pri ebleco kaj nepra neceso de tia agado Friedrich, Ginz, Rosa, Kotoulek, Krysta, Höfert, Šustr kaj kiel rezulton de la diskuto la kongreso proklamis kiel la plej urĝan taskon por tiu ĉi jaro: Ĉiu aktiva esperantisto klopodu, ke ni nepre plenumu tiun taskon!

b) Propagando ĝenerala. O. Ginz rakontis siajn spertojn de multjara laboranto: ne estas vero, ke rezultoj de la laboro perdiĝas. Rezultoj de nia laboro postrestas. Estu tio konsolo al tiuj, kiuj timas, ke la fruktoj de ilia laboro ne estas tuj videblaj. Nia nuna situacio ne estas komparebla kun situacio antaŭ jaroj precipe koncerne seriozecon de intereso de la ekstera publiko. Plej evidenta estas tiu ŝanĝo en nombro kaj kvalito de informpetoj venantaj al nia asocio. Ginz montras 16 demandojn, venintajn dum unu lasta semajno. La demandantoj estas homoj, pri kiuj ni jam ne povas trovi, kiamaniere atingis ilin nia propagando. Temas pri homoj el tre diversaj medioj: studento, kolonelo, germana oficisto ktp. En la diskuto estis raportite pri jenaj novaj metodoj de propagando: MUDr. Vaněk (Dolní Bousov) disdonas al leterportistoj E-krajonojn. Steloj sur benzin-pumpiloj estas tre efikaj (Dr. Vaněk, Krysta). Mendu esperantlingve komercaĵojn! (P. Rosa, Bratislava). Organizu viziton de fremdlandaj esp-istoj al Zlín! (Raszka.) Disaŭdigu pli ofte himnon per radio!

c) Cseh-metodaj instruistoj, prelegvojaĝoj de fremduloj. J. Friedrich konsilas al lokaj grupaj agantoj, ke ili ne timu aranĝi proponatan kurson kaj aŭ prelegon. La rezulto estas ĉiam bona, se la afero estas bone preparita. Eĉ se ne rezultas profito, ne malĝoju, la celo de la grupo

ja estas fari propagandon, ne ŝpari la monon. La kotizojn ni ja kolektas por propagandi (Ginz). La prezidanto uzis la okazon por esprimi la al gesamideanoj Seppik, Scherer kaj Friedrich dankon, diritan en la raporto, ankaŭ en la kunveno.

d) Propagando per gazetoj. Estis prezentita al la kunveno tre plaĉe kaj zorge aranĝita kolekto de eltranĉaĵoj el gazetoj, farita de Staně kaj Chlebowy. Ĝi trovis ĝeneralan aprobon kaj admiron. O. Ginz atentigis pri la persista laborado de J. Šupichová sur tiu ĉi kampo kaj proponis sendi al ŝi saluttelegramon. Akceptita kun granda aplaŭdo. Ginz atentigas pri pluraj polemikoj kontraŭ esp-o, kiujn volis komenci konata occidentalisto. Spite diversaj artifikaĵoj occidentalistaj en ĉiuj kazoj restis nerefutebla impreso, ke niaj teorio kaj praktiko estas pravaj. Tiel eĉ occidental batalas por ĝusta solvo de internacia lingvo. — La prezidanto akcentis, ke la kongreso estis zorge preparita ankaŭ per ĵurnala propagando, pro kio meritas dankon s-o Inĝ. Krajc, kiu zorgis pri la afero, kaj Ostrava-redakcioj de České Slovo, Duch času, Moravskoslezský denník. La nomitaj redakcioj akceptu de ni dankon pro saĝa kompreno de nia celado.

e) Radio. Kongreso decidis danki Radio-journalon en Mor. Ostrava pro oftaj E-disaŭdigoj kaj gratuli al artistoj de TRAKT pro kvalitoj de iliaj prezentadoj.

f) Turismo. Vicprez. Ginz informis, ke diversaj niaj proponoj kaj raportoj pri servoj faritaj, pri kiuj parolas la Raporto, sukcesis jam almenaŭ tiom, ke estas en oficialaj lokoj preparataj novaj turistaj gvidiloj kaj prospektoj esperant-lingvaj. Šustr akcentis, ke dum la jaro estis en Klubo en Praha akceptitaj esp-istoj el 20 fremdaj landoj. Rosa (Bratislava) rekomendas sendadi aŭ disponigadi E-materialon al Čedok kaj al aliaj porfremdulaj institucioj. Neužil atentigis pri franca iniciato turni sin al parlamentanoj. Vicprez. Mr. Höfert atentigis pri graveco de stacidomaj tabuloj kaj pri steloj pentritaj aŭ fiksitaj sur privataj domoj.

g) Libro-Servo. Vicprez. Ginz insistas pri graveco de tiu aranĝo, kiu povus finance tre helpi al la Asocio. Ĝis nun la rezulto financa ne estas kontentiga, ĉar multaj samideanoj komercas pri la libroj. Sole se tiu komerco estos centrigita ĉe la Asocio, ĝi povos utili al la membroj tiom kiom al la kaso. Prez. Kamaryt rememorigis la grandajn servojn, kiujn dediĉas al la movado kaj asocio s-o Fr. Slavík en siaj du funkcioj kiel estro de oficejo kaj de Libro-Servo kaj proponas, ke la kongreso danku al li rezolucie. Akceptita aklame kun aplaŭdo.

h) Kaso. La kasraporto publikigita en tiu ĉi numero estis disdonita presita al kongresanoj. La kasisto Friedrich disponigis plurajn ekz. de detalaj klarigoj al interesantoj kaj donis diversajn klarigojn pri detaloj. Tre interesa estis lia sciigo pri konstato de Scherer: Neniu el bone funkciantaj naciaj societoj vivas ekskluzive el siaj propraj rimedoj. Ĉiu bezonas kaj havas mecenojn, kiuj kovras deficitojn kasajn. Nia asocio estas laŭ tiu vidpunkto escepto. Ni efektive vivas, kaj vivas tre forte kaj amplekse, el sumetoj kolektitaj per kotizoj kaj per regulaj gajnoj. Estas en tio granda forto, ĉar ni dependas de neniu krom de ni mem. (Aplaŭdoj bruaj.)

3. *Raporto de la revizoroj.* Vicmembro de la Kontrola komisiono Prof. Inĝ. L. Krajc deklaris, ke li esploris la asocian kontlibron, komparis ĝin kun la dokumentoj, trovis la kontojn kaj kalkulojn en tre bona ordo kaj interrespondon de enskriboj kaj dokumentoj. Li rekomendas al la kongreso la aprobon de la finkalkuloj pri la j. 1936. Poste estis raportoj pri agado kaj pri la kaso aprobitaj aklame ĉiesvoĉe.

4. *Ŝanĝo de Asocia statuto* (II. § 3, ch). Prez. Kamaryt sciigas, ke la Asocio estas petinta la Landan oficon pri speciala koncesio librovendista, kaj ke estas laŭ dekreto de la nomita ofico n-ro 8043/2/36 odd. 26 necese kompletigi la koncernan paragrafon per sekva amendo:

„Ĝi entreprenas profesian librovendejon kaj libroeldonejon limigitan je literaturaĵoj verkitaj en internacia lingvo Esperanto aŭ problemon de tiu lingvo koncernantaj". Do § 3 alineo ch tekstos: „Prizorgas abonon kaj aĉeton de gazetoj kaj libroj verkitaj en internacia lingvo aŭ ĝin koncernantaj. Entreprenas profesian librovendejon kaj libroeldonejon limigitan je literaturaĵoj verki-

## Internacian kurson por Ĉe-instruistoj en Lázně Bělohrad

intencas aranĝi dum nuna somero tiea Esperantista klubo. Provizorajn aliĝojn (kun responda afranko) sendu al la sekretario s-ro L. Bechtold, Lázně Bělohrad, Švehlova 2 kaj vi ricevos ĝustatempe ĉiujn informojn.

taj en internacia lingvo Esperanto aŭ problemon de tiu lingvo tuŝantaj". La Centra komitato proponas, ke la kongreso aprobu tiun amendon. La prezidanto balotigas pri tiu propono kaj la kongreso aprobas ĝin ĉiesvoĉe. La prezidanto konstatas, ke la kongreso estis regule kunvokita laŭ § 14. de la Statuto kaj ke sekve la proponata amendo estas laŭstatute aprobita.

5. *Nia sinteno al internacia organizo.* La prezidanto rememorigis la detalan diskuton okazintan dum la hieraŭa vespero kaj rekomendis, ke la opinio, al kiu ni venis, estu esprimita per rezolucio. La rezolucion proponis P. Rosa:

*„La kongreso unuanime aprobas, ke la komitato aligis la asocion al IEL kaj ĝi rekomendas al ĉiuj esperantistoj en nia lando grandnombre aliĝi al IEL kiel aktivaj membroj. Sed la kongreso samtempe petas insiste Universalan Esperanto-Asocion kaj Internacian Esperanto-Ligon, ke ili ĉesu kvereli kaj ke ili faru reciprokan interkonsenton. IEL estu centra organizo de landaj asocioj kaj UEA centra organizo de individuaj esperantistoj. Ili ne laboru unu kontraŭ la alia, sed harmonie kunlaboru ĉiu sur sia propra kampo. Ili eldonu komunan jarlibron, por ke ne estiĝu konfuzo."*

Akceptita ĉiesvoĉe.

6. *Duminuta silento.* La prezidanto petis, ke la kongreso per ekstaro kaj duminuta silento honorigu rememoron pri la mortinta honora membro Josef Eiselt kaj de mortintaj anoj Fr. Štourač (Brno), P. Karel Zouhar, Frant. Hochman (Olomouc), Rudolf Vejnar (Hradec Králové). Honoron al laboro de ili farita!

7. *Elektoj.* La prezidanto informas, ke laŭstatute la hieraŭa komitata kunveno aranĝis lotumadon, laŭ kies rezulto eliĝas el la komitato 4 ĝisnunaj komitatanoj: T. Kilián, F. Heikenwälder, L. Krysta, Fr. Staněk. La komitato decidis proponi jenajn 4 kandidatojn: Vuk Echtner, Fr. Heikenwälder, Ludoviko Krysta, Inĝ. Lad. Krajc. Ĉiuj estis elektitaj aklame ĉiesvoĉe.

La prezidanto informas, ke laŭ la sama procedo eliĝas vickomitatanoj Jan Janda kaj Anna Tarantíková kaj estas proponataj Inĝ. Rud. Novák (Plzeň) kaj Růžena Vilémová (Uh. Hradiště). Ankaŭ ili estis elektitaj ĉiesvoĉe.

Por Kontrola komisiono proponis komitata kunveno s-ojn Jar. Bartoň (Košice), J. V. Dolinský (Turč. Sv. Martin), J. V. Šamla (Brno) kiel membrojn, T. Kilián (Třebíč), Fr. Staněk (Praha) kiel vicmembrojn. Ankaŭ ili estis ĉiesvoĉe elektitaj.

La prezidanto esprimis en nomo de la kongreso dankojn al la eliĝantaj funkciuloj pro la laboro, kiun ili dediĉis al nia asocio.

8. *Liberaj proponoj.*

a) Krei el ŝtate ekzamenitaj instruistoj komisionon por privataj ekzamenoj pri E. (E.K. Brno). La komitato rekomendas akcepti la proponon kaj krei apartan komisionon. Akceptita ĉiesvoĉe.

b) Kurso por Cseh-metodaj instruistoj en L. Bělohrad estas projektata por julio 1937 (E.K. en L. Bělohrad). La kongreso ĉiesvoĉe rekomendas organizon de la kurso kaj partoprenon al interesantoj.

c) Granda Esperanto-Tago en Uh. Hradiště, 4—5-an de julio 1937, laŭ invito de tiea SEK. La kongreso aklame kaj ĉiesvoĉe rekomendas aran viziton.

d) Dek-taga Seppik-kurso en Trenč. Teplice 1—10-an de julio (Kamaryt). Rekomendita aklame ĉiesvoĉe.

La prezidanto finis la kunvenon per danko al ĉiuj ĉeestantoj.

---

## El la Gazetara Servo.

Tre riĉa estas la kolekto de artikoloj priaŭ peresperantaj, aperintaj de post la lasta resumo (en n-ro 3 de 1936). Ni denove parolas nur pri tiuj, kiuj naskiĝis el la propra iniciato de laboremuloj, ofte eĉ tre kapablaj, talentitaj samideanoj, kaj pri tiuj, kiujn publikigis la nee-ista ĵurnalistaro. Kvankam ni povis denove legi malamikajn parolojn kontraŭ e., tamen, fine, utilo rezultis el la sekvinta polemiko aŭ el la resumo de polemikaj artikoloj. Kutime tio signifas valoran satisfakcion por nia afero. Tiel okazis ankaŭ lasttempe kaj dankon pro tio havu la okcidentalistoj.

Sed ne nur utilon, ankaŭ malutilon iam kaŭzas kunlaboro kun gazetoj, kiam la verkantoj ne estas sufiĉe spertaj. Serioza leganto facile ekkonas tion kaj ricevas malfavoran ideon ne pri la verkinto, sed pri la raportata afero.

*Tial la GS de EAĈSR ĉiam, kaj ree tre emfaze akcentas, ke komencantoj kaj nespertuloj konsultu ĝian helpon. Ne dubu, ĉies kunlaboro estas danke akceptata, tamen necesas scii certajn regulojn, labori laŭ komuninteresaj direktivoj.* Post mallonga ekzerco, fidele sekvante niajn konsilojn kaj sperton, ĉiu sincera verkemulo povas fari laboron utilegan sur tiu ĉi kampo.

Nun ni citu kelkajn la plej rimarkindajn ekzemplojn, pri kiuj ni havas pruvon!

*Zem, Bratislava.* En tiu ĉi imponanta revuo kunlaboras lerte s-ano Pavel Rosa, aperiginta preskaŭ en ĉiu n-ro de la pasinta kolekto longajn artikolojn favorajn al esp-o. Ekz. 15. I. kaj 1. II. „Problém medzinárodnej reči" kun trafegaj argumentoj. La artikolo elvokis respondon de fakulo sur teknika kampo, rekomendanta la anglan lingvon anstataŭ e-on. Pavel Rosa facile refutis tion per la konataj faktoj el tiu sfero. 1. VIII., „Kongres esperantistov", 15. X. kaj 1. XI. ampleksa artikolo „Švédsky hospodársky život" de Henrik Seppik, tradukita de P. R. — 1. IX. ni vidis intervjuon kun Dro Kao pri Ĉinujo.

*Národní politika, Praha,* daŭre aperigas rubrikon „Z esperantského světa" krom oftaj mallongaj notoj kaj artikolo la 16. II. de J. Šupichová pri japana s-ano Dro Aitaro Jamanoi ellerninta per e. la ĉeĥan lingvon, kiun li nun instruas al aliaj japanoj.

*České Slovo, Praha,* opinias, la 25. II., ke . . . malprogresema kaj malĝusta estas la kontraŭstaro al la matematiko de lingvoj — esperanto.

*Lidové Noviny, Brno,* 17. III., malkaŝas en artikolo, ke T. G. Masaryk dum sia politika laboro en Bystřice p. H. tranoktis en la hejmo de Th. R. Čejka, la konata e-pioniro, kies tiaman bibliotekon li tre laŭdis. — 29. III. Dro Fr. Vaněk, Dolní Bousov, informas pri la Ĉeĥoslovaka Antologio. — 31. III. la urbestro de Bystřice rememoras la poresp-an agadon de Th. R. Čejka; dank' al ĝi oni donis al la strato, kie loĝis tiu pioniro, la nomon „Esperanto". — 5. V. ĉiu povis legi, ke e. estas sur la 18a loko inter la plej uzataj lingvoj de la Internacia Labor-Oficejo, Ĝenevo; post ĝi lamas la turka, serba, hungara, rumana ktp.

*Radiojournal, Praha,* atentigas la 21. III. per bonhumorajo „Nerozumím" pri la radiokurso de e. tiam gvidita de Prof. Th. Kilian, kies fotografaĵon ni vidis en tiu gazeto la 23. V. — 20. VI. venis fotografaĵo de e-ista geaktoraro el la tiam radioprezentata dramo Grandhotel Nevada.

*List říšského svazu učitelek, Praha,* 24. III. publikigis la poresp-an enketon de rusa instruistaro pri kvalitoj de lerniloj, 8. V. rubrikon „Z esperantského světa", 20. VI. alvokon, ke ĉs. fakuloj renkontiĝu kun japana pedagogo venonta al Praha por vidi kaj studi lernejajn aferojn.

**Pagu viajn kotizojn!**

Se vi deziras, ke la organizoj landa kaj internacia bone funkciu, subtenu ĝin per via kotizo. Se vi ŝuldas ankoraŭ, sendu la monon tuj al poŝtĉeka konto n-ro 9602 de Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha.

Uzu eventuale blankopagilon, riceveblan en ĉiu poŝtoficejo por 5 heleroj.

---

*Svět mluví, Praha,* 25. III., informas pri e-aj programoj de diversaj radiostacioj. Ĉio ĉi estas el la plumo de J. Šupichová.

*Národní Střed, Praha,* 27. III. La redakcio aperigis artikolon „Řeč milionů — esperanto" pri la Internacia E-Muzeo en Vieno kaj la e-a fako de la Nacia Muzeo en Praha, kaj 8. VIII. artikolon pri „50 jaroj de e., la sola el la artefaritaj lingvoj pruvinta sian taŭgecon".

*Moravský večerník, Olomouc,* 30. III.: „Per kiaj rimedoj seniĝis Estonujo de senlaboreco?" — artikolo rezultinta el intervjuo kun H. Seppik.

*Právo Lidu, Praha,* 31. III. havas longan, bonegan artikolon de Fr. Hájek, „50 jaroj de e." La saman artikolon ni vidis 22. VI. en *Vídeňské noviny, Vieno.*

*Pozor, Olomouc,* 31. III. parolas pri „Virinoj en Estonujo kaj ĈSR" okaze de vizito de H. Seppik. La 29. V. raportas tie J. Šupichová sub „Esperantem do světa", kaj la 15. XI. ŝi alvokas sub „Učme se esperantu" al partopreno en kurso, kiun la gazeto malfermos sur siaj paĝoj.

*Listy milevského kraje,* 1. IV. havas propagandan artikolon de la Klubo de e-istoj el Milevsko.

*Nová Doba, Plzeň,* 5. IV. dediĉis atenton al la jubileo de loka laborista movado e-a sub titolo „jubileo de nobla celado".

*Nový Lid, Brno,* 7. IV. montras bonan juĝon en la afero „Kial e. tiom disvastiĝas" kaj atentigas samtempe pri kursoj. 14. IV. deziras R. Čermák, ke e-istoj pli serioze praktiku la veran kaj gravan pacpolitikan taskon de e. kaj ne uzu ĝin sole por sia amuzo, interŝanĝado de pm. k. s.; li kredas, ke tiam la publiko vidos en ĝi aferon pli seriozan. 29. XI. ĝi defendas e-on en la polemiko pri internacia lingvo en *Volná Myšlenka.*

*Moravský Národní Střed,* 19. IV., malkaŝas, ke la patronino de e. meritas esti Sankta Hildegarda, talentita monaĥino, kiu

jam en la 11-a jarcento verkis artefaritan lingvon „Lingua Ignota" kun 900 radikoj.

*Die Rote Fahne, Praha,* 19. IV. enhavas alvokon „An alle Freunde der Arbeiter-Esperanto-Bewegung" (Esp. im Dienste des Befreiungskampfes der Werktätigen)".

*Kvítko, Praha,* 3. V. sciu, ke la anekdoto pri la lando, kie e. estas hejme, estas jam tro malnova. Ĝi aperis ĉi-foje kun ilustraĵo.

*Nový věstník čs. stráže bezpečnosti, Praha.* 5. V. dediĉis tutan paĝon al informa artikolo de Imrich Zelník, „Úkol reči medzinárodnej", menciante la Ĉe-kursojn de H. Seppik por policistoj en Košice.

*Týden, Železný Brod,* 9. V. pri la sukceso de ekskursa aranĝo de nordbohemaj e-istoj, kiun laŭdire partoprenis 90 p. el 25 lokoj! En tiu ĉi regiona gazeto kontribuas s-o R. Beneš.

*Slovenský Lud, Košice,* 13. V. artikoleto „O spoločný svetový jazyk", estas valora resumo de disputo antaŭ nelonge okazinta en la revuo Zem, Bratislava, dum kiu venkis e. super la angla lingvo. — 27. V. sekvis informa artikolego „Medzinároda reč" de Jedlička.

*Časopis učitelek, Kolín,* 15. V. donis lokon al informa verkaĵo de J. Šupichová, „Potřebujeme esperanta?" Ĝi alvokas instruistinojn lerni e-on. Ni legas, ke mondfama sciencisto Auguste Forel estis e-isto.

*Polední Lidové noviny, Praha,* 15. V. noto, kaj 16. V. longeta artikolo pri e-a radio-elsendado de Grandhotel Nevada. *Nezávislá Politika, Brno,* 16. V. raportas pri la samo kun altrudita rimarko, ke la rubriko pri Occidental kun kurso sekvos sur tiu ĉi loko tuj la venontan n-ron . . .

*Posel od Čerchova, Domažlice,* 16. V. dediĉas unuan lokon al noto pri la per-espa traduko de rakonto Filo de J. Š. Baar en finna lingvo. Mencio pri e. estas ega raraĵo en tiu ĉi regiono.

*Nedělní list, Praha,* 17. V. ŝatas, ke artikolo aperinta originale sur ĝiaj kolonoj, estis tradukita en e-on kaj aperis en Heroldo de Esp. Temas pri la raportaĵo „Vokado malproksimegen en e."

*Kraj, Jihlava,* 22. V. kaj 30. V. redakciaj alvokoj por gvidi kurson en tiu ĉi gazeto. Sekvis polemiko pri diversaj projektoj de lingvo internacia, ni legis multajn kalumniojn kaj malaŭdojn kontraŭ e. Interalie la 16. VI. ekssam-ano J. Voženílek deklaras sian kredon pri la venko de Occidental. Ni avertas tiun progreseman sinjoron, ke li mallonge paciencu kaj li povos trovi admiron en iu Reform-Occidental, pri kiu cetere jam aŭdeblas. 4. XI. pruvas Prof. Th. Kilian la nepuran propagandmanieron de occidentalistoj per artikolo „Mluvte skutky". (Daŭrigo.)

---

# Lokaj informoj.

*Bohumín.* 18 XI. malfermo de kurso por fervojistoj en ejo de la fervojoficejo. Prof. Inĝ. L. Krajc el Mor. Ostrava prelegis pri la signifo de e.

*Boskovice.* La loka kleriga komisiono aranĝis 7. III. e-ekspozicion kaj prelegon de s-o J. V. Šamla pri „Internacia Lingvo Esperanto."

*Bratislava.* 16. XII. jarkunveno de EK kun la kutima programo, kiun sekvis Zamenhofa memorfesto kaj „Tago de la libro". Dum vintro funkciis tri kursoj: Ĉe-metoda por 41 komencantoj kaj Ĉe-metoda rapidkurso por 11 komencantoj, ambaŭ gvidis s-o H. Seppik; perfektigan kurson kun 15 p. gvidis s-o P. Rosa, prez. de EK. Konversacia kurso okazas ĉiumerkrede antaŭ la regula klub-kunveno, je la 7a. en la bankeda salono de YMCA. — 20. I. solena inaŭguro de la „Kluba Parolgazeto", kiu depost tiam estas regula parto de la programoj. — 27. I. prelegis Dro St. Kamaryt pri UEA kaj IEL. — 3. II. amuza Karnaval-Vespero. — 10. II. prelego de s-o Havas pri „Rememoroj je la internacia balo". La novaj funkciuloj de la klubo estas: Honora prez. E. Wanitsek. Prez. Pavel Rosa, vicprez. Otto Charvát, sekr. Pavel Šlechta, protok. Vlado Jukl, kasisto Julio Klapita, bibliot. Julius Havas, klubejestro Fr. Šnajder, prokuroro Stan. Kamaryt, komitatanoj Koloman Kiss, Rud. Popp, Ferd. Vilím. Revizoroj: Alex. Csáder, Jan Tibenský. — EK informas siajn membrojn kaj interesulojn per konstanta angulo en la gazeto „Ruch Bratislavskej Ymcy".

*Brno.* — *EK.* 5. XII. prelegon de s-o H. Seppik pri Laplando ĉeestis 120 p., inter ili multaj Ĉe-kursanoj. Prezidis kaj enkondukis s-o Hoffner. Post la prelego oni kun intereso aŭskultis gramofon-muzikon. — 20. XII. festkunveno okaze de fermo de Ĉe-kursoj gviditaj de H. Seppik, kun ekzameno de kursanoj kaj brila amuz-programo prezentita de aktoroj de la radiostacio. La florornamitan ĉambron en hotelo Passage plenigis pli ol 130 p. Festparolis Prof. Kilian, kantis f-ino Stolejdová kaj s-o Válka. La kursanoj prezentis teatraĵon „Hispana Etiketo". La sukceson oni dankas cetere al s-oj Vondroušek, organizinta la Seppik-kursojn, Borkovec asistinta ĉe la instruado kaj Nečas pro belaj reklamafiŝetoj. Danco kaj libroloterio finis la feston. — S-o Seppik dufoje radioparolis el la Verda Stacio. — La aŭtunan kurson organizitan de EK kaj Komenského vyšší lidová škola (popol-universitato Komenský)

finvizitis 29 gekomencintoj. — 13. I. malfermo de konversacia kvarmonata kurso por 32 p. organizita de la samaj institucioj, gvidata de s-o J. Vondroušek. — 8. II. prelegis s-o J. Scherer pri Usono. — *Katolikoj*: La vintraj kursoj de la Katolika E-Klubo, komencula kaj perfektiga, finis kun 28 p. — 17. II. la klubo aranĝis kune kun la Skandinava kaj Nederlanda Instituto paroladon de nederlanda ĵurnalisto W. van Haugten pri „Nederlando kaj ĝia popolo". — *Laboristoj*: Estas fondata societo de laboristaj e-istoj. Interesuloj turnu sin al s-o Jan Jansa, Brno, Mlýnská, 26. — Malfermo de kurso por lab. komencantoj okazis 11. I.

*Brno-Maloměřice.* En ĉi tiea elementa knaba lernejo e-on oficiale instruas s-o instr. Jos. Jeřábek; 50 p.

*Břeclav.* Oficiala instruado de e. okazas en la loka burĝa lernejo. 39 geknabojn de la 4a klaso instruas s-o instr. A. Vája.

*České Budějovice.* Dum la 12-a ĝen. kunv. de la esp. klubo La Progreso estis elektitaj ges-roj: prez. Rud. Slivka, sekr. Jos. Ploss, vicprez. Václ. Fiala, vicsekr. Vil. Dobes, kas. Karel Hofhansel, reviz. Jarosl. Štrobl, Rud. Dvořák, asesoroj Marie Peinlová, Jos. Ouhled, Alois Moravec, Lud. Bezděka.

*Český Těšín.* 10. I. ĉefkunveno de REL, kiun ankaŭ ĉeestis s-ro H. Seppik kaj reprezentanto de EAĈSR s-o J. Friedrich.

*Dolní Bousov.* 14. I. publika e-parolado de J. R. Scherer.

*Hluk.* EK kunvenas ĉiusemajne kaj havas nun 60 anojn.

*Hradec Králové.* 19. XII. EK aranĝis Zamenhofvesperon. La feston vizitis ankaŭ s-anoj el Pardubice; prelegis Dro Vernar, parolis s-o Pytloun, f-ino Hořejší kaj la 11-jara Pytloun. Unuakta komedio „La stranga malsanulo" fermis la programon. — 8. I. parolado de s-ino E. Seppik pri Estonujo. La paroladon, kiun aŭskultis 460 p., sekvis Ĉe-metoda provleciono. — 15. I. malfermo de Ĉe-metoda kurso kun 13 komencantoj, gvidata de s-ino E. Seppik. — 25. II. malfermo de kurso por 15 komencantoj-fervojoficistoj. Instr. s-o Fr. Pytloun laŭ Ĉe-metodo. — 3. III. ĝen. jarkunveno de EK reelektis prez. s-on Fr. Šneiberk. Ceteraj anoj de la laborkomitato estas: s-oj Dro Weiner, Černý I., Pytloun, Černý II., Sklenčka, Hampl, Groll, Vondráček, Žába kaj s-ino Balvínová.

*Ivančice.* S-o instr. Jar. Sedláček gvidas kurson.

*Jaroměř.* 11. XII. aranĝis la loka grupo de EAĈSR publikan e-paroladon de s-ino Erika Seppik pri „Estonujo kaj ĝia popolo". — 5. I. Ĉe-kurso de s-ino E. Seppik. La malfermon faris Dro Konečný per parolado. Ĉe la fermo de tiu kurso oni aranĝis feston, dum kiu la kursanoj prezentis gajan teatraĵon „Hispana etiketo".

*Jičín.* La urbo eldonis turisman propagand-afiŝon kun e-teksto.

*Karlovy Vary—Karlsbad.* Laŭ oficiala sciigo ĉesis ekzisti la e-societo Verda Stelo en tiu ĉi loko pro manko de membroj.

*Kolín.* 22. I. ĝenerala jarkunveno de EK. Prez. Jan Janda, vicprez. Josef Zindr, sekret. Jan Václavek, kas. Anna Weberová, bibliotek. Jar. Staněk.

*Košice.* En la propaganda kesteto (strato Štefánikova) estas konstanta ekspozicio de aktuala interesa propagandmaterialo. Fine de januaro okazis prelego de s-o J. R. Scherer kun lumbildoj. EK jarkunvenis la 17. II. Oni elektis jenan laborkomitaton: prez. s-o J. Friedrich, vicprez. Inĝ. J. Fischhof, sekr. s-o Št. Szeemann, kas. s-o Fr. Flossmann, bibl. s-ino H. Berkiová k. a. EK havas nun 82 anojn (antaŭan jaron estis 44). — En la regula monata kunveno la 3. III. oni prezentis raporton pri la kongreso en Moravská Ostrava. — Radiostacio Košice elsendis 6 prelegojn de s-o H. Seppik.

*Kutná Hora.* 19. II ĝenerala jarkunveno.

*Kraslice—Graslitz.* 19. V. 36 EK (grupo de GEL) en ĝenerala kunveno decidis likvidiĝi. Laŭ oficiala sciigo la likvido okazis.

*Kunovice.* 25. XI. malfermo de kvarmonata kurso por 20 komencantoj, gvidata de s-o Jan Tchoř, del. de UEA. La ejon en publika urba lernejo senpage disponigis la urbestraro.

*Letkovice.* S-o J. Čech komencis propagandon en tiu ĉi loko.

*Levoča.* Publika e-parolado de s-o J. R. Scherer.

*Lubná.* La vintra kurso aranĝita de la loka E-Rondeto finiĝis 7. II. kun 10 p. Instruis s-o J. Večeře.

*Místek.* 21. II. Ĉe-metoda provleciono.

*Mladá Boleslav.* 13. I. publika e-parolado de s-o J. R. Scherer.

*Moravská Ostrava.* 11. I. publika e-parolado de s-o H. Seppik pri Svedujo kaj montro de provleciono Ĉe-metoda. — 19. I. eksterordinara membra kunveno pro la vizito de s-o J. R. Scherer. — 21. I. publika parolado de s-o J. R. Scherer. — 26. I. ĝenerala kunveno kun parolado de s-o H. Seppik. — En januaro malfermis kurson por laboristoj-komencantoj la „Laborista Akademio". Ankaŭ Kotkova vyšší lidová škola (popoluniversitato) organizis tian kurson.

*Moravská Ostrava—Hulváky.* La laborista e-societo de Mor. Ostrava organizis kurson por laboristoj-komencantoj en tiu ĉi loko. Malfermo 16. II.

*Moravská Ostrava—Vítkovice.* 12. I. Ĉe-metoda provleciono de s-o H. Seppik.

*Napajedla.* Decembre okazis Ĉe-kurso de s-ino E. Seppik.

*Nové Zámky.* 13. XII. solena Zamenhof-Vespero kun riĉa programo bonege sukcesis. Partoprenis anoj de kurso, pri kiu ni jam raportis, kaj s-oj el Bratislava, Levice, Parkan, Komárno, Slov. Meder. — 17. I. ĝenerala jarkunveno de E-Rondo Amika, kiu decidis aliĝi al EA, kaj elektis jenan laborkomi-

taton: honora prez. s-o J. Havas el Bratislava; prez. s-o V. Badin; vicprez-oj R. Kocsis kaj V. Bujarek; sekr. J. Kotoulek; kas. s-ino O Demuthová; bibl. s-ino E. Jezsová. ERA havas nun 70 anojn. Dank' al klopodoj de ili, precipe de s-o Kocsis la movado ege plivigliĝis. — 1. II. la Dopravný úrad ČSD (ŝtatfervoja oficejo) malfermis novan kurson gvidatan de s-o R. Kocsis.

*Olomouc.* 11. III. okazis ĝenerala jarkunveno de la loka societo.

*Opava—Troppau.* En tiu ĉi urbo kaj regiono klopodas s-o R. A. Buxbaum por kolekti kaj organizi e-istojn kaj amikojn de e.

*Otrokovice.* Decembre okazis Ĉe-kurso gvidita de s-ino E. Seppik.

*Pardubice.* 18. I. publika e-parolado de s-o J. R. Scherer pri „Ĉinujo de hodiaŭ kaj morgaŭ".

*Písek.* Pri la revivigo de la loka movado klopodas fervore s-ino F. Uhrová-Křivancová. Aŭtune komenciĝis kurso por 12 komencantoj. Instruas s-ino F. Uhrová-Křivancová kaj s-o Kolář, rofestro. — 13. XII. okazis kunveno por festi la naskiĝtagon de la Majstro.

*Plzeň.* La januara ĝenerala jarkunveno de la loka I borista e-societo elektis jenan laborkomitaton: prez. s-o R. Jonák, vicprez. s-o J. Pešek, sekr. s-o O. Báša, kas. s-o Němec, bibl. s-ino M. Sýkorová, arĥivo: s-o V. Lenk, protokolo: s-o V. Tolar. — 13. I. remalfermo de kursoj por laboristaj komencantoj kaj progresintoj en Peklo. — 27. I. Lidová universita Husova (popoluniversitato Hus) aranĝis debatvesperon pri la demando „Kiu mondlingvo estas la plej taŭga internacia interkomprenilo?" La debaton antaŭiris parolado „Ĉu unueca helplingvo estas necesa?" La popoluniversitato malfermis komence de februaro novajn kursojn por komencantoj. — EK aranĝis 12. XII. Zamenhof-Vesperon kun gaja Nikolofesta programo. Regulaj kunvenoj okazas ĉiusabate vespere en restoracio „U nové pošty", Kramářovy sady 23. Ĵurnaloj Český deník a Nová Doba regule informas pri ĉiuj e-aj aranĝoj, ekz. pri la regulaj dimanĉaj ekskursoj. La preparata laborista, ekonomia kaj metiista ekspozicio 1938 enhavos e-fakon.

*Plzeň-Doubravka.* Filio de la laborista e-societo Plzeň havas nun 18 membrojn. Depost 24. I. funkcias nova kurso.

*Poděbrady.* 4. I. malfermo de kurso por 26 komencantoj. Gvidas, sub protekto de la distrikta kleriga institucio, s-o V. Špůr. Malgranda sed efika ekspozicio en montrofenestro k. a. propagando antaŭiris la kurson. — La banloka administracio eldonis novan gvidlibron en e.

*Poprad.* Okazis publika parolado de s-o J. R. Scherer.

*Praha.* — *EK:* 13. XI. parolado „5 jaroj en fremdula legio", kun lumbildoj. 1. XII. Sankt-Nikolaa Vespero, gajiga programo, donacoj, dancado, ĵazorkestro. — 27. XI. prelegis Prof. Urban pri la nova konstitucio en USSR. — 10. XII. Nikolaa Vespero kun gajiga programo: kantoj, ĝazmuziko, gajaj scenoj, danco kaj donacoj. — 18. XII. „Tago de la Libro", kun ekspozicio de e-aj verkoj. S-o V. Echtner prelegis pri „La politika kaj religia kredo de Zamenhof", la prezidanto kaj s-o O. Ginz parolis pri la signifo de la Tago kaj e-a literaturo. — 9. I. la klubo aranĝis publikan paroladon de s-o J. R. Scherer en la urba legejo; lumbildoj. — 5. II. s-o V. Echtner prelegis pri „Nusle, la plej antikva urboparto de Praha." — 19. II. programriĉa vespero: muziko, kantoj, deklamado. — 26. II. jarkunveno. — 5. III. parolis s-ino J. Bendová pri la kongresparolado de Lidja Zamenhof. — 12. III. prelego de f-ino Št. Bálková „Afrikon!" pri postkongresa marvojaĝo al Tripoliso. — *Blinduloj:* La jam anoncitan oficialan instruadon en la instituto de Hradčany partoprenas 25 komencantoj instruataj de s-o B. Čálek laŭ porblindula eldono de la lernolibro de J. Šupichová. Laborkunveno de SOĈNE 12. I., decidinta eldoni la duan volumon de ĉeĥaj naciaj kantoj en e-a traduko, tekston kaj melodion kaj daŭrigi la eldonadon de la revueto senŝanĝe; la unua n-ro de la 18-a jaro aperos la 15. II. La societa kaso subvencios partoprenon de blinduloj en la kongreso en Varsovio. Jarkunveno 9. III. en „Louvre" reelektis la malnovan komitaton: prez. A. Kuchař, vicprez. K. Jelínek, sekr-oj f-inoj A. Dirnová kaj M. Miksch, bibl. f-ino M. Polednová, ĉiuj nevidantaj; konfidato s-o R. Bloch, kas. s-ino A. Bárochová, vidantoj. — La Orientala Instituto aranĝis la 12. I. paroladon de s-o J. R. Scherer pri Ĉinujo.

*Praha—Malá Strana.* EK daŭre gvidas senpagajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj. — 28. I. ĝenerala jarkunveno, en kiu prelegis s-o kons. K. Koutek „Pri la vivo kaj verko de Zamenhof".

*Praha—Nusle.* Rondeto de e-istaj kelneroj anoncis por la 25. kaj 26. XII. kunvenojn kun sorĉaĵoj de s-o „Splito".

*Prešov.* 28. II. publika e-parolado de s-o J. R. Scherer pri Hollywood.

*Příbor.* 15. III. finiĝis kurso por 30 komencantoj, kiun gvidis s-o instruisto Ant. Sattek. Organizintoj estis la loka kleriga konsilantaro kaj E-Rondeto Příbor.

*Slezská Ostrava.* 13. I. Ĉe-metoda provleciono de s-o H. Seppik. 16. I. malfermo de Ĉe-metoda kurso gvidata de s-o H. Seppik.

*Spišská Nová Ves.* 29. I. aranĝis Sokol publikan e-paroladon kun lumbildoj de s-o J. R. Scherer. Temo: Romantika Hollywood.

*Stará Ľubovna.* Tre persistan propagandon en tiu ĉi loko faras s-o H. H. Vogelfang, kiu individue instruas 6 komencantoj.

*Tisovec.* 1. II. publika e-parolado de s-o J. R. Scherer. Temo: La mistera Ĉinujo. Lumbildoj.

*Třebíč.* 11. II. publika e-parolado „Japanujo, la lando de la venonta Olimpiado“ kun lumbildoj de s-o J. R. Scherer. La aranĝon propagandis lokaj gazetoj „Stráž“ kaj „Horácko“.

*Třinec.* 6. I. laborkunveno de REL por organizi la prelegojn de s-oj J. R. Scherer kaj H. Seppik. — 21. I. malfermo de Ĉe-kurso gvidata de s-o H. Seppik. Ĝin antaŭiris propaganda e-ekspozicio.

*Uherské Hradiště.* Decembre Ĉe-kurso de s-ino Erika Seppik. 20. XII. Amuz-Vespero kun teatraĵo, recitado, muziko, kantoj. — 5. II. publika e-parolado kun lumbildoj de s-o J. R. Scherer. — SEK sin preparas akcepti 4.—5. VII. esp-istojn en sia loko okaze de granda regiona kultur-ekspozicio, kiu havos e-fakon. Oni solenos samtempe malkovron de jubilea e-monumento.

*Warnsdorf.* La Ĉs. Laborista Asocio E-ista organizas „Semajnfinan Lernejon“ okazontan la 29.—30. V. en naturamika domo en Jägerdörfel. La asocio faras rimarkindan propagandon en 5 gazetoj, kie aperas regule e-lingvaj artikoloj. Dum la 5-a jarkunveno okazonta la 26.—27. VI. en tiu ĉi loko, ĈLAE festos sian kvinjaran ekziston kaj la dekjaran ekziston de la loka laborista movado.

*Vodňany.* 15. XII. EK festis la datrevenon de la naskiĝo de la Majstro per speciala kunveno.

*Vyškovice.* La loka grupo de DTJ aranĝis la 17. I. prelegon pri „La signifo de e. por laboristoj“. La aranĝon sekvis malfermo de kvarmonata kurso senpaga.

*Znojmo—Znaim.* 12. II. okazis publika parolado de s-o J. R. Scherer. Temo: Japana familia vivo. Lumbildoj.

*Žilina.* Fondiĝis Fremdlingva Rondeto, kiu havas sekcion e-istan.

Novaj kursoj,

pri kiuj mankas al ni detaloj, estas malfermitaj en jenaj lokoj: Frýdek 9. II.; Plzeň (Peklo) 1. III.; Plzeň-Doubravka 24. I.; Poruba apud Orlová 7. II.; Přerov 11. XI. Bonvolu konigi al ni iliajn organizantojn, nombron de kursanoj kaj kursgvidanton!

## Esperantista vivo.

26-an de decembro 1936 estis festita en Warszawa la edziĝo de nia komitatano s-ro ROBERT BLOCH kun f-ino ESTERA FINKELKRAUT.

La sekvan tagon 27-an de decembro 1936 nia alia komitatano s-ro JOSEF DONNER festis sian edziĝon kun f-ino MIZZI RICHTER en Schwertberg, Supera Aŭstrio.

Ambaŭ niaj kunlaborantoj akceptu plej koran bondeziron!

S-ro AŬGUSTIN BUHR, patro de nia komitatano František Buhr, mortis la 24. III. 1937. Sinceran kondolencon!

# Radio.

*Brno* (samtempe Praha I. kaj Mor. Ostrava):

23. XII. Dalibor Chalupa: Pacon kaj ĝojon al homoj de bona volo! Kristnaska radiofilmo. Trad. Marie Strejčková. Ludis kaj kantis anoj de TRAKT sub direkto de D. Chalupa.
7. I. B. Smetana—K. Sabina—J. V. Šamla: Vendita Fianĉino. Komika opero. Prezentis anoj de TRAKT kaj de la Landa Operejo kaj Radio-Orkestro Brno, estrata de J. Plichta.
4. II. Douglas P. Boatman: La Decido. Radioludo prezentita de anoj de TRAKT sub gvido de D. Chalupa.
4. III. Karel Mužík: La milito ankoraŭ ne finiĝis. Radioludo. Trad. Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Prezentis anoj de TRAKT. Reĝio de D. Chalupa.
15. IV. (je la 22.20—23.30). Fr. Langer: Kavaleria Patrolo. Trad. V. J. Šamla. Prezentos anoj de TRAKT. Reĝio D. Chalupa.

*Brno* (sola):

23. II. Užaku—Akita: Nokto sur la landlimo. Japana ludo. El esperanto tradukis J. Bezdíček.

*Moravská Ostrava* (elsendas regule ĉiumarde de la 18.00 ĝis 18.10 m):

1. XII. MUDr. J. Frank: Por saniga edukado de la junularo.
15. XII. Fr. Bláha: Esperanto kaj Occidental en artikoloj de ĉs. gazetoj.
22. XII. Dr. J. Horák: Pri la rilatoj inter Ĉeĥoslovakujo kaj Polujo.
29. XII. Dr. Fr. Žilka: Ni rajtas esti optimistoj.
29. XII. Radio-filmo „Lando sen montoj“ (Estonio). Prezentis anoj de TRAKT kaj s-o H. Seppik.
5. I. M. Hašek: Sur ĉs. fervojoj oni vojaĝas rapide, sekure kaj malkare.
12. I. Fr. Bláha: Nia 28-a Universala Kongreso.
19. I. Fr. Uhlíř: Ĉs. laboristoj eksterlande.
26. I. Ad. Sýkora: Evoluo kaj stato de lernejoj en la regiono de Opava.
9. II. Dro Ot. Weigl: La regiono de la urbo Těšín kaj ĝia loĝantaro.
16. II. Henrik Seppik (Estonujo): Kiel la maljunaj estonoj kulturis muzikon.
23. II. Ot. Gadula: Foiraj aktualaĵoj.
24. II. S-ino E. Seppik (Estonujo) radioparolis okaze la memortago de la estona nacia sendependiĝo.
9. III. Al. Zbavitel: La regiono Těšín kaj la ĉs. unueco.
16. III. H. Seppik (Estonujo): Kion estono vidis en Ĉeĥoslovakujo.
23. III. Dro Karel Stloukal: La ĉs. historio en la jaroj 1848—1914.
30. III. Al. Červenka: La urbo Ostrava iam kaj nun.
6. IV. O. Gadula: Ostrava antaŭ turisma sezono.
13. IV. Prof. Dr. Hugo Traub: Feliĉa momento en la historio de la ĉs. popolo antaŭ 20 jaroj.
20. IV. O. Gadula: La montaro Bezkydy invitas vin.
27. IV. K. Tauš: Moravia eltrovo, kiun konas la tuta mondo (kelkaj vortoj pri kuba sukero).

**Nova oficejo de EAĈSR** komencis funkcii 1. IV. 1937. Helpu en ĝia aranĝo! Donacojn sendu al la poŝtĉeka konto de EAĈSR. Antaŭan dankon al ĉiuj amikoj!

## Informoj.

La **Unuiĝo de altlernejaj asocioj por Ligo de Nacioj** en Praha deklaris laŭ peto de EAĈSR per sia letero de 3. XI. 1936 al la Internacia paca organizo de la junularo en Londono, ke ĝi kun ĝojo aliĝas al ĝia rezolucio parolanta pri neceso uzi esperanton en laboro celanta tutmondan pacon.

**Germana Gazeta Servo en ČSR**, gvidata de la komitatano s-ro Josef Karl Donner, Plan apud Marienbad, bezonas kunlaborantojn, precipe en kolektado de la aperintaj artikoloj. Samideanoj dezirantaj helpi skribu al s-ro Donner.

**XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.** La ministerio de fervojoj koncedis por la partoprenantoj de la kongreso 25 % rabaton. Rabatilon sendas por 10 Kč (al eksterlando por 4 respondkuponoj) EAĈSR. Eksterlandaj partoprenantoj vizitantaj antaŭ aŭ post la kongreso Ĉeĥoslovakan respublikon, ricevas laŭ decido de ministerio por eksterlandaj aferoj la ĉeĥoslovakan vizon senpage. Nia Turista komisiono, gvidata de s-ro Robert Bloch, preparas specialajn aranĝojn antaŭ la kongreso kaj karavanan vojaĝon al Varsovio. Por pago de afranko ni sendas kongresajn aliĝilojn kaj afiŝojn.

**La ministerio de fervojoj** konstatis en sia oficiala organo eksterordinaran sukceson de esperanta radioparolado, kiun aranĝis la fervoja direkcio en Olomouc. La ministerio konsilas tial ripeton de tiaj paroladoj.

**Novaj glumarkoj** aperos en plej proksimaj tagoj!

**Konatiĝu kun esperantaj gazetoj!** 10 diversajn gazetojn de pasinta jaro por Kč 10·— sendos Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha 47. Pagu per blankopagilo sur poŝtŝparkasan konton n-ro 12.371.

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo EAĈSR afrankite por la notita sumo.

*J. Mihálik de Hernádszurdok,* Meritplena vivo kaj patriota agado de *Francisko Rákoczi* la II-a, elektita hungara naciestro. Eld. Hungara Esperanto-Federacio, Budapest. 16 pĝ 15x23 cm. Prezo Kč 3·20. — Unua kajero de serio, preparata kun la laŭdinda intenco forigi la interpopolan malamon, kiun en iuj landoj politikistoj, gazetoj kaj lernejoj instruas. El la prezentata broŝuro legos historiamantoj multon por ili sendube interesan, sed restas demando, ĉu la eldonaĵo efikos en la supre aludita senco. Jam en unuaj linioj ni legas pri „hordoj el Bohemujo", pri la malamataj germanoj kaj ĉie pri sangaj bataloj. Ni esperu, ke ne sole heroojn de sabro kaj pafilo oni gloriĝos, ĉar laŭ nia konvinko ne ili kondukas la mondon al pli bona estonto.

*Librosignon* montrantan la belan barokan enirejon en la monaĥejon de Břevnov kun esperanta stelo en la mezo farigis por sia biblioteko František Buhr en Praha-Břevnov.

*Tutmonda Fakadresaro 1936.* Eld. Internacia Ligo de esperantista poŝt- kaj telegraf-oficistaro. 76 pĝ 11x15 cm. Prezo ne montrita. Por membroj de ILEPTO senpage. Utila adresaro de poŝtistoj-esperantistoj kun portretoj de la ĉefaj laborantoj. Aldonita nomaro de esperantaj gazetoj. ILEPTO kun sia bona faka organo meritas vere pli fortan subtenon flanke de la samfakanoj.

*La Juna Vivo.* Tiu bonega gazeto por junuloj kaj por komencantoj ĝenerale prezentas sian duan jarkolekton denove binditan. La bela libro kun 184 pĝ 16x24 cm estas eksterordinare taŭga lernilo por ĉiu, kiu volas facile enpenetri en la lingvon. Lingvo estas tie instruata laŭ tute speciala metodo, enestas facilaj legaĵoj, ofte kun bildoj aldone. Prezo Kč 14·—. Nova jarkolekto (komenciĝis 1. VII. 1936, 12 nroj) Kč 16·50.

*Literatura Mondo,* la sola literatura gazeto, en kiu kunlaboras ĉiuj gravaj verkistoj esperantistaj. Abonu por 60 Kč jare ĉe EAĈSR. Specimena n-ro 3 Kč.



## Vizitu la ĉarman sudan Bohemion!

Esperantistoj de České Budějovice sincere invitas samideanojn ĉeĥoslovakajn kaj eksterlandajn al vizito de tiu pentrinda historia urbo kaj ĉirkaŭaĵo. La proksima lima montaro Šumava prezentas unikan refreŝiĝon en plej pura aero, plej agrablajn promenojn tra netuŝita naturo, tra praarbaroj kaj preter grandaj lagoj.

Per via vizito vi subtenos la esperantan movadon en tiu ĉarma parto de nia ŝtato. Anoncu vian venon al s-ro J. Ploss, sekret. de Esp. Klubo La Progreso, České Budějovice, Skuherského 63.


Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.